

Val 101

Bulgara **ESPERANTISTO**



7-8

1971

Nikola Aleksiev. Al la decidoj — vojon en la vivon! . . .	1
* * * Rezolucia na Plenuma na BEC (28. VI. 1971) . .	3
* * * Asembleo de la Tutmonda Packonsilantaro en Budapeŝto (El „Pacaktivulo“)	5
* * * Intervjuo kun docento Vasil Ĉoĉov	7
Ivan Nedjalkov. Malavara donacinto	8
Dimitr Mutuŝev. Ni memoru la esperantistojn-heroojn . . .	9
K. V. Granda intereso al la historio de Esperanto kaj la E-movado	9
D. Novakov. Neforgesebla renkontiĝo	10
V. Dankova. La Esperanto-klaso en Popovo	10
Ilija Kolev. Vivo dediĉita al Esperanto	10
Iv. Bril. Internacia prilerna ekspozicio en Ĥarkov	11
Ida Lisiĉnik. Du diplomoj de unua grado al Esperanto-klaso	12
V. Grigaitis. En mezlernejoj de Litovio	12
Oldřich Knichal. Manpremo kun heroo Vjetnamio	13
A. Skupas. La lingvistikaj konceptoj de Friedrich Engels .	14
Rajna Konstantinova. Marjorie Boulton	15
Asen Grigorov. Balado pri rivero Ĉatkal	17
Ljuba Bojaĝieva. Letero al usona patrino	18
Stojan Kostadinov. Dimitrov-maŭzoleo	19
Nevena Nedelĉeva. Por la unua fojo	19
Prodan Prodanov. Elreviĝo	22
Todor Ŝoŝev. Soneto. Denove la printempo venis	23
Penka Batoeva. Nigrulino	24
Mihail Ŝekerĝiev. La sinofero	25
Ivan Krilov. Du hundoj. Trad. Ljubomir Miĥajlov	27
Vesela Ivanov. Neatendita renkontiĝo	27
Mihail Ĉobanov. Likviditaj kontoj	30
Stefan Kiraĝiev. Printempa panoramo	32
Fritz kaj Elli Hoffmann. Belaj tagoj en Bulgario	33
* * * Deziras korespondi	34

Sur la kovrilpaĝo:

La esperantistoj estimas siajn pereintajn heroojn-kontraŭfaŝistojn (pilgrimado al la pereolokoj de Stoju Kalpazanov kaj Vela Peeva — vidu paĝon 9)

Abonkotizo: jara — 1,40 levo, duonjara — 0,70 lv. Por eksterlando — 2 lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,60 lv. Por Italio — 1000 liroj. Aparta numero — 0,14 lv. Reklamtarifo: 0,15 lv. por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ALBANIO: Inĝ. Cefo Fiko, R. Kongresi Pêrmetit 7—11/10, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, str. Francesco Nullo 2, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, Bukaresti 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika, D. 7, kor. 3, kv. 44, Moskva M—449.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109.

**AL LA DECIDOJ — VOJON EN LA VIVON!**

Fine de junio ĉ. j. kunsidis la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio. Ĉiuj distriktaj komitatoj kaj societoj jam posedas ĝiajn decidojn. Por nia membraro ili prezentas programon por agado ĝis la venonta jaro, kiam okazos nia landa Esperanto-Kongreso.

La laboro de la Plenkunsido de CK de BEA estis ege faciligita, ĉar ĝi baziĝis sur la decidoj, kiujn aprobis la Deka Kongreso de Bulgara Komunistarta Partio. Por nia popolo kaj ĉiuj ĝiaj organizaĵoj, inkluzive BEA, tiuj decidoj prezentas bonegan fundamenton por ilia agado dum la sekvanta periodo. La partia programo donas perspektivon por jardekoj. La Direktivoj de la Sesa Kvinjara Plano konkretigas ĝin por la plej proksima periodo de kvin jaroj ĝis 1975.

Do, al nia Asocio ne mankas science preparita kaj aŭtoritate aprobita marksisma-leninisma perspektivo kaj programo por ĝia estonta agado. Surbaze de tiu perspektivo la Plenkunsido de CK de BEA konkretigis la taskojn de nia Asocio. Nature, nia landa 38-a Esperanto-Kongreso daŭrigos tiun ĉi laboron, iniciatitan nun.

Ne estas necese analizi detale la rezolucion de la Plenkunsido. Ĝi estas sufiĉe klara. Ni opinias utila emfazi nur la ĉefajn direktojn de nia agado surbaze de la rezolucio. Kion ni devas entrepreni por doni animon al la decidoj, transformi ilin en vivan praktikon, doni al ili vojon en la vivon?

UNUE: *antaŭ ĉio ni devas pripensi kiamaniere plifortigi niajn distriktajn komitatojn kaj la societojn. Oni devas utiligi ĉiujn organizaĵajn metodojn kaj formojn, kapablajn kontribui por la organiza stabileco de ĉiuj ĉeneroj de nia Asocio: plibonigi la laboron de la asociaj gvidorganoj; pliaktivigi la malfortajn DK kaj societojn, revivigi estingiĝintajn aŭ formale ekzistaatajn, krei novajn — kun pli energiaj kaj iniciatemaj estraroj.*

Agante tiel, ni nepre atingos la deziratan gradon de organiza stabileco. Paralele kun tio kaj kiel sekvo de ĝi ni sukcesos krei ankaŭ la necesajn premisojn por intensigo de nia ĉiuflanka agado sur diversaj terenoj: ideologia, politika, kultur-kleriga, eldona, eduka, lingva, propaganda, financa ktp. Tiamaniere ni fortikiĝos kaj okupos pli indan lokon en la vico de sociaj organizaĵoj, kiuj estas kolektivaj membroj de la Patrolanda Fronto. Tio nepre levos pli alten la aŭtoritaton de nia Asocio. La informoj pri la agado de iuj DK kaj societoj montras klare, ke oni ricevas moralan kaj materialan subtenon por la esperantistaj iniciatoj nur surbaze de bonaj kaj celkonsciaj praktikaj rezultoj en la laboro de ties estraroj.

DUE: *por doni similan direkton al nia ĉiuflanka agado, ekskluzive grava estas la profunda konatiĝo kun la kongresaj dokumentoj de BKP. Ne*

sufiĉas ties rapida, supraĵa tralego, estas necesa pli ampleksa, funda studado. Ebleco por atingi tion ekzistas ĉiuloke. Krom tio, oni devas organizi ilian propagandon inter la esperantistaro en nia lando. Ni devas fariĝi ardaĵ propagandistoj de la enhavo de l'kongresaj dokumentoj, kies realigo per la laboro de nia popolo garantios ĉiam pli kreskantan vivnivelon de nia loĝantaro en ĉiuj sferoj. Ja kiu sincera patrioto-esperantisto ne sopiras pli helajn morgaŭajn tagojn, senĉesan suprenleviĝon de la ekonomio kaj kulturo de sia popolo?

Jen gravega por ni tasko, kies realigo manifestos nian popolan patriotismon, kiel edukis nin la neforgesebla Georgi Dimitrov.

Krome, la profunda studado de la partiaj dokumentoj levos la nivelon de nia kompetenteco pri ilia konkretigo sur esperantista tereno en ĉiuj anguloj de nia Fatrolando.

TRIE: *la esperantistoj en nia lando estas ne nur sinceraj patriotoj, sed ankaŭ ardaĵ internaciistoj. Ni pli malpli aktive partoprenas diversajn internaciajn esperantistajn forumojn. Laŭ la rezolucio de la Flenkunsido ni havas seriozajn taskojn ankaŭ tiudirekte: ĉie ni devas inde prezenti nian landon kaj nian Asocion, konigi al niaj eksterlandaj amikoj la pacajn atingajojn de nia popolo en la konstruado de la pli feliĉa vivo, la praktikan agadon de nia Respubliko por konservo kaj stabiligo de la paco sur la Balkanoj, en Eŭropo kaj en la tuta mondo.*

Jen la ĉefaj linioj de nia agado.

Al streĉa laboro por novaj sukcesoj, pri kiuj ni povus raporti solene antaŭ la 38-a Kongreso de la bulgaraj esperantistoj!

ДО ЦЕНТРАЛНИЯ КОМИТЕТ НА БЪЛГАРСКАТА КОМУНИСТИЧЕСКА ПАРТИЯ

Скъпи другари,

Пленумът на Централния комитет на Българския есперантски съюз, свикан на 28 юни т. г. в София, за да обсъди предстоящите задачи на българските есперантисти във връзка с решенията на Десетия конгрес на Българската комунистическа партия, Ви изпраща възторжените поздравии на всички български есперантисти.

Състоялият се неотдавна Десети конгрес на Партията начерта ясни перспективи за изграждане на развито социалистическо общество в нашата страна. Приетите от него документи с историческо значение — Програмата на Партията и Директивите за развитие на Народна република България през шестата петилетка, както и неговите решения, са за нас, българските есперантисти, мъдро ръководство за действие. Ние заявяваме, че с ентузиазъм ще дадем принос, за да се превърнат в живо дело смелите начертания на Десетия конгрес.

Най-благородният идеал на българските есперантисти е бил винаги световният мир, приятелството и сътрудничеството между всички народи на земята, независимо от тяхната общественно-политическа система. Ето защо ние с цяло сърце и душа горещо подкрепяме неотклонната и мъжествена борба на Българската комунистическа партия срещу

най-заклетия враг на човечеството — световния империализъм и неговите пъклени военноподпалвачески планове, борба за мир, за приятелство и сътрудничество между народите, за оживен обмен на материални и духовни ценности между тях.

Въоръжени с мъдрите решения и историческите документи на Десетия конгрес на родната Комунистическа партия, ние, българските есперантисти и занапред ще вършим неуморно нашето благородно дело: чрез международния език есперанто да служим на нашата социалистическа Родина, да участвуваме активно в изграждането на развито социалистическо общество у нас, да популяризираме в чужбина грандиозните постижения на нашето социалистическо строителство, нашата героична история и процъфтяваща култура и изкуство, красотите за нашето мило Отечество, да разпространяваме истината на нашия свободолюбив и миролюбив народ, да се борим за мир и дружба между всички народи на земята.

Да живее родната Комунистическа партия — организатор и вдъхновител на всички наши победи по пътя към най-щастливото човешко общество — комунизма!

От Пленума



РЕЗОЛЮЦИЯ

На Пленума на ЦК на БЕС, състоял се в София на 28 юни 1971 г.

Трудещите се от градове и села работят самоотвержено, за да превърнат в живи дела решенията на историческия Десети конгрес на Българската комунистическа партия.

С единодушното одобрение на целия български народ бе приета новата Конституция на Народна република България — правната основа на развитото социалистическо общество. Новата Конституция дава на обществените организации още по-широки възможности за активно участие в социалното управление, а това е основната насока в по-нататъшното развитие на социалистическата демокрация.

Десетият конгрес прие новата Програма на Партията — исторически документ за изграждане на развито социалистическо общество в нашата Родина.

„Като основен теоритически и политически документ, Програмата има грамадно значение за цялата идеологическа работа на Партията, на Комсомола, на Професионалните съюзи, на Отечествения фронт и другите масови организации, за правилното възпитание на трудещите се. (Т. Живков, Отчетен доклад пред X конгрес на БКП).

По блестящ начин бяха проведени изборите за Народно събрание, народни съвети, съдии и съдебни заседатели. Избирателите се сплотиха като един човек около листата на Отечествения фронт и манифестираха още веднъж морално-политическото си единство.

След като изслуша и обсъди доклада на Бюрото на ЦК на БЕС „За предстоящите задачи на българските есперантисти по изпълнение на решенията на Десетия конгрес на Българската комунистическа партия“, Пленумът на ЦК на БЕС

РЕШИ:

I

1. Напълно одобрява оценките, изводите и насоките, дадени в Отчетния доклад на ЦК на БКП, изнесен от др. Тодор Живков пред Десетия конгрес, и приема Програмата на Българската комунистическа партия като основа за бъдеща дейност и на българските есперантисти.

Приема със задоволство новото конституционно положение за ръководната роля на Българската комунистическа партия в държавния и обществен живот на нашето общество.

Всички свои успехи след Девети септември 1944 г. българските есперантисти постигнаха под близкото ръководство и решаващата подкрепа на Партията. За нас е голяма чест да работим и занапред под мъдрите грижи на БКП, издържала изпита на историята в продължение на осем десетилетия славни и

героични борби за щастието и благоденствието на българския народ.

Призовава българските есперантисти да дадат своя принос за изпълнението на Директивите за шестата петилетка навсякъде, където те работят — в индустриалните предприятия, аграрно-промишлените комплекси, транспорта, търговията и съобщенията, научните институти, учебните заведения, държавните органи и пр.

2. Съдържанието на цялата наша културно-просветна и политико-възпитателна работа трябва да бъде разясняването на документите на X конгрес и особено усвояването на дълбоките и правдиви идеи, вложени в партийната Програма — незаменимо оръжие за успешна борба против идеологическата диверсия на империализма и най-добра основа за изработване на марксистко-ленински мироглед у всички български есперантисти.

Да се отбележат по достоен начин 80-годишнината от Бузлуджанския конгрес, на който бе учредена революционната марксистка партия в България, и 90-годишнината от рождението на незабравимия учител и вожд на българския народ Георги Димитров.

3. Построяването на развито социалистическо общество има огромно значение не само за по-пълното задоволяване на материалните и духовните потребности на нашия народ, но и за достойното нареждане на Народна република България в редицата на най-развитите страни в света.

Високопатриотичен и интернационален дълг на всеки български есперантист е да запознава системно своите приятели от социалистическите и капиталистическите страни с успехите, постигнати в практическото осъществяване на грандиозната перспектива, очертана пред нашия народ в решенията на Десетия партийен конгрес, както и да печели нови приятели на нашата страна и на социализма.

4. Възлага на Бюрото на ЦК на БЕС да направи необходимите постъпки пред Комитета за приятелство и културни връзки с чужбина да издаде в превод на есперанто основните документи на X партийен конгрес и съвместно с Българския есперантски съюз да ги разпространява между есперантистите в цял свят.

II

1. Българският есперантски съюз напълно се солидаризира с дейността на Българската комунистическа партия „за издигане на международния престиж на Народна република България, за укрепване на единството на световната социалистическа система, за заздра-



вяване позициите на световното революционно движение и на световния мир“.

Горещо одобрява оценката в Резолюцията на X конгрес, че дружбата и сътрудничеството със Съветския съюз е непоклатима основа на външната политика на НРБ и че БКП винаги е свързвала и свързва строителството на социализма и комунизма, развитието на целия революционен процес с КПСС и Съветския съюз.

Пленумът призовава българските есперантисти да създават още по-тесни братски връзки със съветските есперантисти за двустранно и многостранно сътрудничество на международната есперантска арена, като винаги помнят, че дружбата между нашите и съветските есперантисти е част от нерушимата българо-съветска дружба — гаранция за успешното изграждане на зряло социалистическо общество в Родината на Димитър Благоев и Георги Димитров.

2. Българските есперантисти чувствуват като свое морално задължение да разясняват вътре и особено вън от страната последователните и настойчиви усилия на БКП и на правителството на НР България да провеждат тази единствено правилна външнополитическа линия на мир, дружба и взаимно разбирателство между народите от всички страни и континенти.

Те оказват открита и братска подкрепа на народите на Виетнам, Камбоджа, Лаос и арабските страни в тяхната борба против престъпната агресивна политика на Съединените американски щати и техните марионетки в Индокитай, Близкия изток и в други невралгични пунктове на земното кълбо, където димят пожарищата на войната или тлеят военни конфликти.

3. В своята кореспонденция с чужбина, в срещи с есперантисти от други страни по време на международни конгреси, конференции, семинари и други есперантски форуми българските есперантисти трябва да се държат като пламенни патриоти на своята социалистическа Родина и да издигат високо знамето на мира и дружбата между народите против агресивната политика на САЩ и тяхните съюзници от различните империалистически блокове и съюзи.

4. Пленумът изказва своето дълбоко задоволство от приемането на Световното есперантско движение (МЕМ) в редиците на Световното движение на привържениците на мира, както и от избирането на председателя на МЕМ — др. Никола Алексиев, за член на Световния съвет на мира.

Ние ще продължим с още по-голяма настойчивост да укрепваме МЕМ и ще стоим винаги в първите редици на есперантистите — борци за мир и дружба между народите на Балканите, в Европа и целия свят.

Както досега, така и занапред българските

есперантисти ще сътрудничат с Националния комитет за защита на мира и комитетите за мир по места в борбата против империализма и в защита на законните интереси на всички народи, които се борят за национална независимост и социална справедливост.

Есперантските дружества в цялата страна под ръководството на съответните окръжни комитети на БЕС трябва да вземат още по-активно участие с най-разнообразни инициативи в провеждането на станалата вече популярна и традиционна Седмица на международното приятелство, организирана всяка година от есперантските движения в пъл свят.

III

1. Пленумът изразява своята дълбока загриженост от неудовлетворителното организационно състояние на немалко окръжни комитети на БЕС и на редица есперантски дружества.

2. Особено внимание трябва да се обърне върху това — да се привличат за членове на дружествата млади работници и специалисти, които изучават есперанто в курсове или самостоятелно, за да се осигури необходимата приемственост в работата на нашето движение.

3. Естественото текучество в онези дружества, в които има значителен процент учащи се или са изцяло съставени от ученици или студенти, трябва да бъде преодоляно чрез активно привличане на нови членове из средата на курсистите, както и с препоръка към всички завършили своето образование да се включат в дейността на есперантското дружество там, където отиват да работят или да продължат образованието си.

4. Да се положат усилия за пълното отчитане на членския внос за минало време до края на настоящата година, а през първата половина на 1972 г. в чест на 38-я конгрес на Българските есперантисти всички дружества да се отчетат за цялата 1972 г.

5. Окръжните комитети да използват отчетно-изборната кампания през есента и зимата, за да попълнят своите състави с енергични активисти, а също да помогнат на дружествата да си изберат дейни ръководства.

6. Пленумът задължава окръжните комитети да обърнат особено внимание на изоставашите дружества върху територията на своя окръг, както и да възстановят замрели дружества или да изградят нови, където са налице необходимите условия.

7. Окръжните комитети да положат максимум усилия за привличане на учители както в местните, така и в задочните и присъствени курсове, които са организирани от Учителската секция, БЕК и някои окръжни комитети на БЕС. Мнозина от завършилите после могат да станат правоспособни преподаватели в кръжоци и курсове по есперанто, с което ще от-



говорим и на изискванията на новия правилник на Министерството на народната просвета.

8. Препоръчва се на всички окръжни комитети, по примера на Плевенския ОК на БЕС, да проведат окръжни или междукръжни предконгресни срещи с оглед на по-нататъшното организационно-финансово укрепване на движението в съответния окръг.

9. Секционните ръководства да засилят своята дейност по диференцирането на методическо ръководство над дружествата, като работят по близко с ЦК на БЕС.

10. Да се засили работата по привличане на нови абонати за съюзния орган „Булгара Есперантисто“.

11. Да продължи кампанията по набиране на допълнителен дялов капитал и записване

нови членове на Българската есперантска кооперация, за да бъде улеснено чрез нея задоволяването на редица потребности на движението у нас.

12. Задължава Бюрото на ЦК да осигури постоянно отговорно лице от Бюрото в канцеларията за даване необходимите указания на посетителите-организационни работници.

Пленумът изразява своето дълбоко убеждение, че под ръководството на ЦК на БЕС, на окръжните комитети и дружествените ръководства българските есперантисти ще направят сили, за да се справят добре със задачите, произтичащи за тях от решенията на Десетия конгрес на БКП и за достойна среща на 38-ия национален есперантски конгрес през 1972 година!

Al la Nacia Komitato por Defendo de la Paco

Karaj k amaradoj,

La Plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio, okazinta je la 28-a de junio ĉ. j. en Sofio, sendas al vi plej varmajn salutojn kaj sincerajn bondezirojn por novaj sukcesoj en via nobla agado en defendo de la internacia amikeco kaj kunlaboro, sur la kampo de la mondopaco.

La bulgaraj esperantistoj estis ĉiam fidelaj batalantoj por paco kaj kompreniĝo inter la popoloj. Per la lingvo Esperanto, kiu faciligas ilin trovi amikojn en plej diversaj socitavoloj en ĉiuj landoj de la mondo, ili donas realan kontribuon por krei etoson de kunlaboro kaj reciproka estimo inter la popoloj, sendepende de la soci-politika ordo de iliaj landoj. La bulgaraj esperantistoj senrezerve subtenas la batalon kontraŭ la imperiismo kaj militarismo, kontraŭ la renaskiĝanta faŝismo kaj naciismo kaj staras firme en defendo de heroa Vjetnamio, Laoso kaj Kamboĝo, en defendo de la landoj de la araba mondo, viktimoj de la israela agreso, en defendo de ĉiuj popoloj minacataj de la imperiismo. Laborante senlace por la triumfo de la pacama politiko de nia Popola Registraro kaj nia patrolanda Komunista Partio, ni per plej laŭta protesta voĉo postulas, ke estu ĉesigita la senprecedenca konkurado en la armado, ke estu limigita la strategia armilaro, ke estu senkondiĉe kaj komplete malpermesita la kemia, bakteriologia kaj nuklea armilaro, ke oni kunvoku konferencon de la kvin ŝtatoj posedantaj nuklean armilon por limigo de la armitaj fortoj, lokitaj en la centro de Eŭropo, ktp. Ni insistas, ke oni en plej baldaŭa tempo kunvoku tuteŭropan konferencon, kiu pridiskutu kaj daŭre solvu la bazajn problemojn de la paco kaj sekureco en Eŭropo.

Vivu la paco, la amikeco kaj la kunlaboro inter ĉiuj popoloj sur la tero!

De la Plenkunsido

ASEMBLEO DE LA TUTMONDA PACKONSILANTARO EN BUDAPEŬTO

De la 13 ĝis la 16 de majo 1971 en la belulino de Danubo okazis la Asembleo de la Tutmonda Packonsilantaro (TPK). Ĝi estis granda evento en la evoluado de la tutmonda movado de la pacbatalantoj.

La ĉefa elemento en la graveco de tiu renkontiĝo de la pacbatalantoj el ĉiuj kvin kontinentoj kuŝas en la zorgema pridiskuto kaj aprobo de gravaj decidoj pri la plej aktualaj problemoj de la batalo de l'popoloj kontraŭ la agresemaj agoj de la usona imperiismo. La Asembleo esprimis la novan plilarĝiĝon de tiu plej amasa movado de nia epoko. Ĝi malfermis antaŭ la pacbatalantoj novajn perspektivojn en ĉiuj landoj kaj regionoj de la mondo.

La Budapeŝta Asembleo estis vere impona forumo de la pacamantaj fortoj de la tuta planedo. Neniam ĝis nun estas fiksita tia granda nombro de reprezentantoj de pacamaj organizaĵoj kaj movadoj el tiom multe da landoj. Por partopreni tiun ĉi pacaman renkontiĝon en la hungaran ĉefurbon venis ĉirkaŭ 800 delegitoj el 124 landoj kaj el 33 internaciaj organizaĵoj. Pri la granda intereso al la Asembleo atestas ankaŭ la fakto, ke preskaŭ triono de la delegitoj reprezentis organizaĵojn kaj movadojn, kiuj ne membras en la Tutmonda Packonsilantaro.

S-ro U Tahn, la ĝenerala sekretario de la Unuiĝintaj Nacioj, kiel ankaŭ vico da ŝtatestroj de landoj kun malsama sociordo, salutis la Asembleon per specialaj mesaĝoj. Ili bondeziris novajn sukcesojn al la internacia pacmovado sur ĉiam pli larĝa bazo.

Eĉ la raporto de la ĝenerala sekretario de TPK s-ro Romesh Shandra estis videbla la evoluo de la tutmonda pacmovado dum la lastaj jaroj kaj la antaŭstarantaj taskoj.

La Asembleo manifestis la grandan kredon je la pacovenko. Ĝi registris la grandegajn ŝanĝojn en la mondo kaj en la rilato de la homoj al la pacproblemoj. Dum la raportita periodo la tutmonda pacmovado atingis novan svingon tra la tuta planedo.

La multfojaj provoj de la imperiismo starigi la homaron antaŭ la sojlo de nova tutmonda milito estis fiaskigitaj de la pacamaj fortoj. La malamata koloniisma sistemo ricevis mortigan baton. Ĝi travivas siajn lastajn tagojn. En la landoj, troviĝantaj ankoraŭ sub la jugo de la koloniismo kaj rasismo, la naciliberiga movado estas en ĉiam pli kreskanta suprenleviĝo.

Kiaj ŝanĝoj okazis en la tutmonda pacmovado mem lige kun ĝia kreskinta forto kaj internacia prestiĝo?

Eĉ elementa analizo de la nuna stato de l'tutmonda pacmovado montras ĝian nunan kreskon. En ĝi partoprenas ne nur ĉiuj landoj, kiuj ĝis antaŭnelonge suferis sub la ŝarĝo de la koloniismo. En ĝi eniris politikaj fortoj, kiuj rilatis suspekteme eĉ al la vorto „paco“ mem. Nun ili decide ekstaris je la flanko de la pacamaj fortoj kaj kune batalas kontraŭ la milito kaj la imperiismo. Io pli: jam ne nur la organizita pacmovado, kiu kreskis rimarkinde, sed ankaŭ centoj da internaciaj kaj regionaj, naciaj kaj lokaj organizaĵoj el ĉiuj partoj de la mondo kontribuas al la komunaj streboj, al paco kaj amikeco inter la popoloj. Milionoj da ordinara

homoj tra la tuta mondo manifestas nun ĉiam pli grandan komprenemon kaj kredon en la forteco de la monda socia opinio.

La vortoj „La paco estas afero de ni ĉiuj“ jam ne plu estas nura slogano. Ili transformiĝas en senteblian realecon, en veron, kiu konkeras la korojn kaj la mensojn de la homoj kun bona volo.

La kreskanta eskalado de la imperiisma agreso, la grandiĝinta minaco pri tutmonda milito, la malfeliĉoj kaj la suferoj de la popoloj, viktimoj de la imperiisma agreso, kreis la kondiĉojn por apero de novaj organizaĵoj kaj movadoj, kiuj unuigis diversajn mediojn de la loĝantoj ĉie en la mondo. Ili bone komprenis, ke estas maleble bari la vojon de la militfortoj sen komunaj kampanjoj kaj agadoj.

Eble la ĉefa unuiganta elemento estus la solidareco kun la heroeca batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la agreso de Usono en Vjetnamio. Eĉ en Usono mem kreiĝis amasa kaj forta kontraŭmilita movado, kiu daŭre kreskas, atingante nekonatajn en la historio de tiu lando dimensiojn de protestaj demonstracioj. Tiu movado okupiĝas ne nur pri batalo por ĉesigo de la milito en Hindoĉinio, sed ĝi ligas tiun ĉi batalon por paco kun la batalo kontraŭ la mizero kaj la rasismo, kun la batalo de la negra loĝantaro por civilrajtoj. Tio nome unuigis multajn organizaĵojn en Usono kontraŭ la agresemo de l'usona imperiismo, kulpa ne nur pro la malfeliĉoj de la popoloj, kiuj estiĝis ĝiaj viktimoj, sed ankaŭ la usona popolo mem tre multekoste pagas pro la frenezaj ideoj de la milit-industria komplekso kaj ankaŭ suferas pro la milito.

Sur tiu vojo de komunaj kampanjoj ekiris ankaŭ la pacmovadoj en aliaj landoj.

Fakto estas, ke jam pasis pli ol 26 jaroj post la militfino kaj la imperiismo ĝis nun ne kuraĝis bruligi no-



van tutmondan militon. Sed estas fakto ankaŭ, ke la minaco de imperiismaj provokoj kaj krimoj ankoraŭ estas aktuala kaj ke nur la fortoj de la paco respektigas la imperiismon en ĝiaj periodaj atakoj kontraŭ la libereco kaj la sendependeco de apartaj landoj kaj popoloj.

Do, estas nun pli ol iam ajn necese batali kontraŭ tiu serioza minaco kontraŭ la paco kaj la libereco de la popoloj.

Ni ĉiuj scias, ke la Mondpaca Esperantista movado (MEM) delonge, eĉ depost sia fondiĝo, luktas por paco sub la idea egido de la Tutmonda Packon-

silantaro. Nun venis la momento, kiam laŭ invito de TPK nia MEM fariĝis membro de TPK. La prezidanto de MEM estis elektita membro de la Tutmonda Packonsilantaro.

Tiu fakto estas ĝojinda por la tuta esperantistaro, ĉar ĝi montras estimon kaj fidon al la pacamo de ĉiuj esperantistoj. Des pli ni, MEM-anoj, devas taksi ĝin tre alte, ĉar la konfido signifas ankaŭ reciprokan devon.

Por povi pravigi tiun ĉi altan estimon al MEM flanke de TPK, ni pliaktivigu nian pacagadon inter la esperantistaro en la mondo!

El n-ro 88, 1971 „Pacaktivulo“

INTERVJUO KUN DOCENTO VASIL ĈOĈOV

Dum kunveno de la Sofia Esperanto-societo „Maksim Gorkij“, okazinta la 18-an de majo j. k., estis intervjuita samideano Vasil Ĉoĉov, docento ĉe la Supera Ekonomia Instituto „Karl Marks“, pri lia libro „La libera tempo kaj la



harmonia evoluo de la homo“, aperinta en 1970.

La intervjuon gvidis la prezidanto de la societo Nano Nanov. Al k-do Vasil Ĉoĉov estis direktitaj kelkaj demandoj, al kiuj li donis detalajn respondojn.

Ĉi-sube ni donas la demandojn kaj la respondojn en konciza formo.

Demando: *Kamarado Ĉoĉov, kio instigis vin verki tiun ĉi libron, kial vi elektis tiun temon?*

Respondo: *Observinte la laborulojn dum lia libera tempo kaj farante diversajn es-*

plorojn surbaze de la kolektitaj materialoj, al mi faris grandan impreson la fakto, ke la laboruloj ne ĉiam utiligas racie sian tempon kaj eĉ ofte sencece malŝparas ĝin. Ĝuste tio instigis min verki la libron.

Demando: *Kion ni devas kompreni sub la nocio „libera tempo“?*

Respondo: *Iuj opinias, ke la tuta tempo, resinta post la labortago, estas libera tempo. Tiu opinio estas erara, neĝusta. Por restarigi siajn fortojn por la sekvonta labortago la homo bezonas dormon, zorgon pri hejmaj pri-servoj, zorgon pri infanoj k. a. Ĉi tie oni povas inkluzivi ankaŭ la tempon necesan por iro kaj reveno al kaj de laboro. Do, la restanta tempo estas la efektiva libera tempo. Kiel ni vidas, tiu tempo, almenaŭ por nun, estas tre limigita.*

Demando: *Kiaj estas viaj impresoj pri la eluzado de la libera tempo flanke de la laboruloj, apartenantaj al diversaj soci-kategorioj?*

Respondo: *Dum miaj esploroj mi konstatis, ke la laboruloj de diversaj kategorioj — laboristoj, oficistoj, intelektuloj k. a., ne uzas egale sian liberan tempon por altigi sian kulturan evoluon. Ekzemple la oficistoj ĝenerale legas pli multe da libroj ol la laboristoj, kaj la laboristoj pli multe ol la vilaĝanoj. Simila diferenco ekzistas rilate aŭskultadon de muziko, vizitadon de teatroj, okupon pri sporto ktp. Tiu rezulto de la faritaj enketoj laŭ mi estas instrua por la koncernaj respondecaj faktoroj, kiuj devas fari siajn konkludojn.*

Demando: *Kia estas la rolo de la individuo en la pasigado kaj eluzado de ĝia libera tempo?*

Respondo: La racia kaj utila eluzado de la libera tempo en la socialisma socio ne estas nur privata demando. En nia lando estas kreataj ĉiam pli kaj pli favoraj kondiĉoj por la utiligado de la libera tempo. Sed la aparta persono devas samtiel racie organizi sian tempon, se li deziras esti kontenta de si mem. Tio estas precipe demando de edukado, sed ankaŭ de memedukado. Racia eluzado de la libera tempo estas ankoraŭ pli necesa, ĉar en la nuna dinamika, teknika kaj kultura epoko, kiam oni strebas al utiligo de ĉiu minuto, la perdo de tempo ŝajnas anakronismo. des pli, se oni konsideras, ke ĉiu pasinta tempo estas senrevene perdita kaj al la estonto oni ne ĉiam povas certe kalkuli. La efektiva, reala tempo estas la nuna, tamen ĝi tiel rapide forflugas, ke estas necese kapti ĉiun momenton kaj ĝin utiligi.

Demando: Kia estas la rolo de la multlingveco en la racia utiligado de la libera tempo?

Respondo: La multlingveco mem estas grava malhelpo, por la utila eluzado de la libera tempo, ĉar perdon de tempo por lernado de multaj lingvoj oni ne povas kompensi. Anstataŭ uzi la tempon por tiu celo oni uzu ĝin por diversaj aliaj celoj en la kadro de la harmonia evoluo de la homo.

Demando: En via libro vi mencias pri „stelistoj“ de tempo. Kion vi havas antaŭvide?

Respondo: Ĉe gastado aŭ ĉe hazardaj renkontiĝoj multaj homoj, trouzante la paciencon kaj la ĝentilecon de siaj konatoj kaj amikoj,

forprenas de ili valorajn minutojn, eĉ horojn. Tie ĉi oni povas kalkuli ankaŭ la tro longajn kunsidojn kaj kunvenojn,

Demando: Vi partoprenis la sociologian mondkongreson en Varna en septembro 1970. Kiaj estas viaj impresoj pri la solvo de la lingvo-problemo dum la kongreso?

Respondo: Mi efektive partoprenis tiun kongreson kaj mi mem spertis grandajn malfacilaĵojn tiurilate. La oficialaj laborlingvoj estis la franca kaj la angla. Dume multaj kongresanoj parolis rusan, germanan, hispanan kaj aliajn lingvojn. Oni tradukis en kelkajn lingvojn nur dum plenkunsidoj. La plimulto de la delegitoj el la socialismaj landoj posedis plej bone la rusan lingvon. Tiamaniere la lingva kaoso denove montriĝis, kiel tio okazas dum aliaj internaciaj kongresoj sen uzado de komuna lingvo. Do, estas urĝa bezono de komuna internacia lingvo.

Demando: Ĉu via libro ne povus aperi almenaŭ en konciza formo en Esperanto?

Respondo: Mia libro havas resumon en franca lingvo. Mi preferus ankaŭ resumon en Esperanto, sed tio ankoraŭ ne estas kutimo ĉe ni.

Mi estus tre kontenta, se mia libro povus aperi eĉ en pli konciza formo en Esperanto. Tio povus okazi, se la estraro de la societo „M. Gorkij“ kaj tiu de la Asocio farus paŝojn en tiu rilato antaŭ la koncernaj faktoroj de niaj eldonejoj, kiuj okupiĝas pri fremdaj lingvoj.

MALAVARA DONACINTINO

En vilaĝo Gabarevo, distrikto de Stara Zagora, loĝis ĝis antaŭ nelonge



la malnova esperantistino Anastasija Miĥalĉeva Baklarova, 75-jaraĝa. Ŝi estas fratino de la elstara pacamiko-esperantisto d-ro Todor Miĥalĉev Baklarov, kiu, forpelita de sia patrolando, post 40-jara migrado tra Eŭropo, revenis en Gabarevon, intencante travivi la lastajn jarojn de sia vivo en la naskiĝvilaĝo.

Li intencis lasi al sia amata Gabarevo ian memoraĵon, tial testamentis al ĝi sian novekonstruitan domon, por kiu li elspezis sian tutan ŝparitan monon. En la nova domo li vivis nur unu jaron, post kio grave malsaniĝis kaj la 1-an de majo 1969 estis enterigita en sia naskiĝvilaĝo.

La modelan domon ricevis la heredintoj — lia fratino Anastasija kaj la nevoj el la alia fratino. Anastasija volis donaci sian duonan parton de la domo

NI MEMORU LA ESPERANTISTOJN-HEROOJN!

La 12-an — 13-an de junio laŭ iniciato de Esperanto-societo „Stoju Kalpazanov“ en Velingrad, la lokaj esperantistoj kune kun s-anoj el Sofio, Plovdiv, Pazarĝik, Ruse k. a. celebris siajn pereintojn en la kontraŭfaŝisma batalo, la esperantistojn-heroojn Angel Ĉopev, Vela Peeva kaj Stoju Kalpazanov, ĉiuj el Velingrad.

En la vesperiĝo de la 12-a de junio la pilgrimantoj portante florkrĉonojn direktiĝis al la domo, kie estis mortigita Angel Ĉopev. Pri la vivo kaj heroo batalo de Ĉopev, kiu aŭto-didakte ellernis Esperanton, parolis kortuŝe k-do Manol Ĉolev. Parolis ankaŭ unu el la parencoj de Ĉopev. Ŝi rakontis, kiel li pere de Esperanto sukcesis kontaktiĝi kun germana samideano kaj certigi armilaron por la batalo. Ŝi montris ankaŭ koncernajn fotojn.

Dum la vespero parto de la esperantistoj komune vespermanĝis en la unuagrada restoracio „Kleptuza“.

La matenon de la 13-a de junio la esperantistoj direktiĝis per aŭtobusoj al la pereolokoj de Vela kaj Stoju. La Esperanto-paroloj rompis la silenton de la arbaro. Frunte de nia kolono flirtis la verda standardo kun la nomo de Stoju Kalpazanov, kiu estas patrono de la loka E-societo. Ĉe lia ekzekutloko parolis k-do Dimitr Peŝterski. Lernantoj el Velingrada gimnazio plenumis belartan programon en Esperanto kaj bulgara lingvo.

Post ripozo apud montodomo „Kladova“ nia kolono daŭrigis la marŝadon al la rokoj, kie

en kruela batalo, sola kontraŭ multnombra malamiko, pereis kun pafilo en la mano la legendea Vela. Pri ŝia vivo kaj batalo parolis k-do Nikola Godev. Junaj homoj plenumis kolektivvan recitalon dediĉe al la amata, neniam mortanta popola heroino. K-do Manol Ĉolev dankis al ĉiuj partoprenintoj kaj apelaciis al la junaj homoj daŭrigi fervore la lernadon de Esperanto, fariĝi indaj posteuloj de Vela, Stoju kaj Angel, batali per Esperanto por iliaj altaj idealoj pri socia justeco, interpopola amikeco kaj paco sur la tero.

Dimitr Mutuŝev

GRANDA INTERESO AL LA HISTORIO DE ESPERANTO KAJ LA E-MOVADO

En majo kaj junio ĉ. j. la Sofia Instruista E-societo „Diĉo Petrov“ okazigis du kunvenojn, en kiuj nia elstara s-ano Atanas D. Atanasov — membro de l' Akademio de Esperanto, faris prelegojn pri la historio de Esperanto kaj la Esperanto-movado. La temo kaj la personeco de la preleganto vekis grandan intereson inter la sofiaj esperantistoj kaj ambaŭfoje kolektiĝis multa publiko. S-ano Atanasov, unu el la veteranoj de la E-movado en nia lando kaj ties fama aganto ekde 1910 jaro — mem viva historio de l' Movado — tuŝis la demandojn tre subtilaj kaj kompetente. La aŭskultantoj ekkonis multajn ne tre konatajn faktojn el la historio de la E-movado.

Estas bone, ke ĉie la esperantistoj studu pli profunde la historion de la tutmonda kaj enlanda E-movado. Tiamaniere ili akiros novan saĝon, novan entuziasmon kaj stabilecon por labori obstine kaj rezultodone por Esperanto en la nuntempo.

K. V.

al la Bulgara E-Asocio, sed tio pro diversaj kaŭzoj ne povis realiĝi. Tiam ŝi plenumis sian decidon kaj donacis sian parton al la vilaĝa soveto, kiu utiligas ĝin kiel infandomon. Kaj nun tie oni povas aŭdi la ĝojajn kantojn, kriojn kaj ridojn de la feliĉaj infanoj.

Sed ŝia amo al la Internacia Lingvo Esperanto estas senfina. Por helpi la E-movadon kaj por eternigi la memoron de sia neforgesebla frato, ŝi donacis sian gepatran domon al la esperantista societo en Gabarevo, kaj ŝi mem iris loĝi en la domon por maljunaj homoj en Kazanlĉk. Ĉi tie estas du domoj por maljunaj homoj — la unua estas modela, kaj en ĝi oni devas pagi

monate po 65 lv., kaj la alia estas ordinara kun 25 levoj pomonata pago. S-ano Baklarova preferis la duan. Se ŝi vendus la parton de sia frata domo, ŝi ricevus proksimume 20 000 lv. kaj nur per tiu ĉi monsumo ŝi povus certigi trankvilan restadon en la modela domo. Ŝi povis vendi ankaŭ la patran domon. Sed ŝi ne faris tion. Ŝia profunda amo al Esperanto instigis ŝin fari grandan oferon. Ŝi elektis la oferon! Kiom da personoj povus fari tian oferon? Por ŝi kaj por ŝia frato estis grava la strebo al paco kaj amikeco inter la homoj kaj por ili en tio konsistis la socia problemo por justeco kaj egaleco.

Ivan Nedjalkov

NFFORGESEBLA RENKONTIĈO

La 30-an de majo en la Junpionira domo de vilaĝo Batiŝnica, distrikto de urbo Ruse, la lernantaro kaj junularo solene celebris la grandan bulgaran poeton Ĥristo Botev, konekse kun la 85-jara datreveno de lia heroa pereco en la batalo kontraŭ la turka jugo. Estis raporto, riĉa belarta programo. Ni invitis al la solenaĵo ankaŭ la gastojn de k-do N. Nejkov el urbo Dve Mogili — la germanajn gesamideanojn Paŭlo kaj lian edzinon Else el Rostock, GDR. Ilin salutis en Esperanto mia 5-jara nepo Mitko. Agrable ni pasigis la tutan tagon kune kun niaj karaj gastoj.

Laŭ mia invito ili restis ankaŭ dum la sekvanta tago. Mi montris al ili ĉion vidindan en nia vilaĝo: magazenojn, infangardenon, la hospitalon ktp. Interesa estis nia vizito en la lernejoj. Tie ni estis invititaj de la instruistoj en ties ĉambro, kie okazis vigla interparolo, kiun mi interpretis pere de Esperanto.

La instruistinoj estis treege interesitaj pri la Internacia Lingvo, kaj kelkaj el ili esprimis deziron studi ĝin.

La du tagoj, pasigitaj kun niaj germanaj geamikoj, restos neforgeseblaj por mi.

D. Novakov

LA ESPERANTO-KLASO EN POPOVO

Dum la lernojaro 1970/71 en la mezgrada agrikultura lernejo en urbo Popovo funkciis Esperanto-klaso. La lernantoj lernis la Internacian Lingvon kiel fakultativan studobjekton dufoje semajne. Ili jam sukcese aplikas ĝin. Kelkaj korespondas kun lernantoj el Sovetunio, Pollando, Hungario, Jugoslavio, Rumanio. La korespondado stimulas la intereson al la lingvolernado.

Ĉi-somere kelkaj lernantoj partoprenis la turistan E-kongreson en Szeged, Hungario.

V. Dankova



VIVO DEDIĈITA AL ESPERANTO

En kvartalo „Baĵdar“ de urbo Gabrovo en la kvieta strato „Todor Burmov“ 13 troviĝas la Esperanto-muzeo de Elena Kovaĉeva.

Esperanto! Unuafoje ŝi konatiĝis kun la lingvo de d-ro Zamenhof en la dua progimnazia klaso, kiam tute hazarde ŝi trovis ĉe sia konatino Esperantan lernolibron.



— La unua vorto, skribita de mi per Esperantaj literoj, estis Lom — la nomo de mia naskiĝurbo, — rememoras Kovaĉeva. — Ĝin mi skribis per ŝtoneto sur la tero.

La fajrero rapide grandiĝas en flamo kaj malgraŭ ke Elena estas ankoraŭ juna, en 1925 ŝi gvidas sian unuan Esperanto rondeton.

Fininte la pedagogian gimnazion en 1931 Kovaĉeva fariĝas instruistino, kaj ŝia soifo al perfektigo en la lingvo estiĝas nesatigebla. Per memstara legado de Esperanta literaturo, interparoloj kun samideanoj kaj korespondado ŝi atingis sian revon.

Je la 14 de januaro 1955 Kovaĉeva decidas kolekti ĉion, kion ŝi ricevas per Esperanto. Tiel naskiĝas la ideo pri Esperanto-muzeo.

Nur en tiu muzeo la vizitanto povas vidi pupojn en diversnaciaj kostumoj, sonbendojn el Ĉeĥoslovakio, Hungario, Aŭstrio, Okcidenta Germanio, Aŭstralio k. a., leterojn, bildojn, bildkartojn, librojn, albumojn, ornamaĵojn, suvenirojn el multaj landoj. Inter la tuta riĉaĵo plej forte impresas ligna pupo kaj tranzistoreto el Japanio, la itala libro „Pentristoj el la tuta mondo“, fotoj kun aŭtografaj de la ĉeĥoslovaka poetino Julia Ŝupinova, de Janoŝ Kadr, Ho Ŝi Min k. a.

En ĉi tiu malgranda Esperanto-angulo la vi-

zitanito povas ricevi imagon kiel vivas la homoj en diversaj lokoj — de la anglaj insuloj ĝis la Lando de la Leviĝanta Suno kaj de malvarma Laplando ĝis varmega Saharo.

Tien ĉi ofte venas gastoj — ĉu bulgaroj, ĉu fremdlandanoj. Kun intereso ili aŭskultas la historion de ĉiu objekto, kiun la dommastrino verve rakontas. Sed plej ofte venas malgrandaj esperantistoj-junpioniroj. Ili scias, ke ĉi tie ili vidos ne nur fabelan mondon, sed ankaŭ ricevos adresojn.

Kovaĉeva ne laboras nur en sia Esperanta muzeo.

Multjare ŝi gvidis E-kursojn en la junpionira domo. Lastatempe ŝi helpas la estraron de la loka E-societo, kolektante membrokotizojn kaj abonkotizojn por „Bulgara Esperantisto“. Ŝi aktive partoprenas la organizadon de diversaj solenaĵoj. Dum pluraj jaroj Kovaĉeva estas membro de UEA kaj lastatempe — ĝia fakdelegito. Ŝi ne povas imagi eĉ tagon de sia vivo sen Esperanto. Laŭ ŝia opinio ĉiu esperantisto, sendepende de sia aĝo, devas ĉiam labori por Esperanto kaj per ĝi — por la plifortigo de la paco kaj amikeco inter la popoloj.

Ilija Kolev

EL SOVETUNIO

INTERNACIA PRILERNEJA EKSPOZICIO EN ĤARKOV

Dum februaro-marto 1971 en la Esperanto-Klubo ĉe la Domo de Instruisto en Ĥarkov (Ukrainio) okazis internacia prilerneja ekspozicio. Sur 15 tabloj-standoj ni montris al la vizitantoj eksonaĵojn de 16 lernejoj el 14 landoj kaj sur unu tablo-stando — infanan korespondadon de loka lernejo kaj kajerojn de „Grajnoj en vento“ (komuna revueto de 20 lernejoj el 20 landoj de l'mondo).

La devizo de la ekspozicio estis: „Super la kapetoj de l'tutmonda infanaro estu ĉiam hela ĉielo“, estu ĉiam la suno!“

La celo de la ekspozicio: per ĝi penetri en la medion de la profesiaj instruistoj en nia urbo, varbi ilin en la Esperanto-movadon kaj komenci instruadon de Esperanto en lernejoj rondetoj.

Kvankam malgranda, nia ekspozicio estis sufiĉe sukcesa kaj interesa. Ni aranĝis ĝin per la malavara helpo de kelkaj partoprenantoj, al kiuj ni tutkore dankas.

Modelo de zorgoj pri partopreno en la ekspozicio, modelo de rilato al komunaj interesoj estas precipe la bulgaroj. Ni petis s-anon D. Borisov aranĝi la aferon kaj li tuj komencis fervoran aktivecon: Borisov turnis sin al BEA, la lasta komisiis sian Instruistan Sekcion kaj rezulte de tio la Klubo ĉe la Domo de Instruisto en Sofio prenis la zorgojn al si kaj trovis decan direktoron (de la 32 gimnazio en Sofio), kiu senprokraste kaj fervore elektis kaj sendis al ni abundan kaj bonegan materialon. En sia letero la Instruista sekcio de BEA skribis al ni: „... .

Via sukceso estas ankaŭ nia sukceso“. La rilato estis vere samideana!

Eĉ post monatoj ŝajnas al ni, ke ni vidas antaŭ ni milojn da kapetoj de knaboj kaj knabinoj el la tuta mondo super siaj kajeretoj, ke ni aŭdas kantojn de du ĥoroj kaj muzikon de grandega orkestro en Sofia lernejo, ke francaj infanoj kvazaŭ persone venis al ni kaj deklamis sian versaĵeton, dediĉitan al samaĝuloj en nia lando.

La plej grandan minuson de la ekspozicio oni povas konsideri, ke ĝi estis tro modesta (nur 16 lernejoj el 14 landoj!). Sed okazis nur la unua etapo de la ekspozicio. Ĝi daŭros sekvan aŭtunon kaj post tio. Do, ĝi ankoraŭ povas fariĝi pli solida, eĉ impona, la sukceso por ni kaj por la E-movado povas multobliĝi. Tial ni turnas nin al ĉefdelegitoj kaj E-asocioj de landoj el ĉiuj kontinentoj: dum la kurranta jaro organizu elsendon almenaŭ el unu lernejo (nur el unu!) de via lando jenajn eksponaĵojn: abocolibron, 2—3 kajerojn de unuaklasanoj, foton de unu klaso (aŭ fotojn de apartaj unuaklasanoj); lernolibron de literaturo por lasta klaso de elektita lernejo; 1—2 literaturajn verkojn de lastaklasanoj; foton de lasta klaso; fotojn pri la lernejo — konstruaĵoj, lerneja ĝardeno, sportplaco, lernejaj aranĝoj (vesperoj, kunvenoj, sportludoj, ekskursoj) ktp., infanajn pentraĵojn kaj manlaboraĵojn; skizon de la lernejo; skemon de la sistemo de popola klerigo (tipoj de lernejoj) en la lando. Ĉio estu en via nacia

La Prezidentaro de la Parlamento honoris per ordeno „Kiril kaj Metodij“ — II grado nian aktivan s-anon Canko Murgin — instruanto de geografio en la Filio de la Sofia universitato en urbo Ŝumen — pro lia bona instrulaboro kaj socipolitika agado.

Niajn gratulojn kaj bondezirojn!



lingvo, nur la notoj por (aŭ sur) la eksponaĵoj kaj la skizo pri la lernejo devas esti Esperantlingvaj.

Ĉion sendu al adreso: **Sovetunio, 310057 Ĥarkov, Skripnika 14, Dom Uĉitelja, Esperanto-klubo.**

Se nin aŭdos kaj favore resonos landaj E-asocioj kaj ĉefdelegitoj en ŝtatoj sen landaj E-asocioj, nia prilerna ekspozicio efektive

multobligos sian sukceson kaj estonte povas fariĝi migranta ekspozicio, kiu ĉiam en nova loko propagandos Esperanton en instruista medio, varbos por la Movado multajn profesiajn instruistojn, tiom necesajn por instruado en lernejoj.

Iv. Bril

prezidanto de la E-klubo ĉe la Domo de Instruisto en Ĥarkov

DU DIPLOMOJ DE UNUA GRADO AL ESPERANTO-KLUBO

Antaŭ nelonge en la ĉefurbo de Kartvelio, Tbilisi, malfermiĝis la 26-a Tutrespublika Krea Konferenco de la Lernantoj.

La Internacia Klubo „Gagarin“ ĉe la Kutaisa Palaco de Junpioniroj sendis al la konferenco du luksajn albumojn, faritajn de l'anoj de la Esperanto-rondeto pri illa internacia agado.

La materialoj de la albumoj faris tian grandan impreson, ke la prezidanto de la Internacia klubo, lernantino de la 10-a klaso, ano de la Esperanto-rondeto Gulnara Ciklauri estis invitita al Tbilisi por rakonti detale pri la laboro de la klubo. Laŭ la peto de la prezidantaro ŝi deklamis Esperantlingve kaj estis aklande salutita de la konferenco.

Du kartvelaj ĵurnaloj — „Gazaphili“ kaj „Lorei Lenieli“ aperigis artikolojn pri la laboro de la Kutaisa Internacia Klubo kaj fotojn de infanaj desegnaĵoj, senditaj de ĝiaj ekster-

landaj korespondantoj.

La prezidanto de la klubo ricevis diplomon de unua grado. La duan diplomon — ankaŭ de unua grado — ricevis la E-rondeto pro sia valora internacia laboro.

Laŭdajn recenzojn pro la literatura traduko de ĉiuj dokumentoj de la albumoj el Esperanto en kartvelan lingvon ricevis ok anoj de la E-rondeto: Nafela Zakarejŝvili, Tengiz Enfelaze, Temuri Zomaŝvili, Nino kaj Givi Ciramua, Tina kaj Nargiza Ĉiĉelaŝvili kaj Ketino Tavaŝeli.

La sukcesojn de la E-rondetoj kaj ilia bona internacia agado oni ŝuldas al la gvidantino de la rondetoj Kristina Kaĝaja, kiu meritis grandan aŭtoritaton en la Palaco de la Junpioniroj kaj amon de ĉiuj rondetanoj pro sia sindona kaj bonega laboro.

Ida Lisiĉnik

EN MEZLERNEJOJ DE LITOVIO

Depost la lernojaro 1968/69 en mezaj lernejoj de Litovio oni komencis instruadon de Esperanto laŭ fakultativa maniero — do, laŭ elekto de lernantoj mem. La Ministerio de Klerigado de Litova SSR eldonis specialan programon, kie i. a. ni legas:

„La lingvo Esperanto prezentas gravan socian fenomenon, valoran rimedon por rilatoj inter la popoloj, uzatan en diversa socia, sciencia kaj pedagogia agado. La lingvo Esperanto ne havas celon anstataŭi la ekzistantajn lingvojn kaj fariĝi sola mondlingvo. Tamen estas klare, ke la socio bezonas egalrajtan kaj paralele kun la nacia lingvo ekzistantan lingvon, kiu povas fariĝi rimedo por komunikado inter ĉiuj nacioj.“

La programo havas 52 lecionjn, t. e. po 1,5 horo ĉiusemajne dum la lernojaro aŭ po 2 horoj semajne dum la unua kaj po 1 horo dum la dua semestro. Krom pure lingva materialo, la programo antaŭvidas konatigon de la lernantoj kun tiaj temoj, kiel kosmo, ekfloro de Litovio dum la soveta periodo, historio de la Esperanto-movado, universalaj Esperanto-kongresoj, Esperanta gazetararo, Esperanta movado en Sovetunio kaj Litovio krp.

Esperanto akiras ĉiam pli grandan interesi-

La forpasinta en majo ĉi-jare soveta skulptisto—esperantisto Nikolaj V. Blajkov el Odeso skulptis en 1967 la E-veteraninou Ida Lisiĉnik.



ĝon de lernantoj. Ĉiujare pli granda nombro de lernantoj elektas Esperanton kiel fakultativan studobjekton. Ekzemple, dum 1969/70 lernoĵaro Esperanton lernis ĉirkaŭ 500 lernantoj, dum 1970/71 estis jam 1110. Fakultativaj grupoj funkcias nun en 45 lernejoj de Litovio. Paralele plivigliĝas la agado de la lernejaraj rondetoj de internaciistoj. En la tuta respubliko famiĝis per sia agado por la internacia amikeco la junaj gelernantoj-esperantistoj de la okjara lernejo en Pasvalis (instruistino B. Aukštikalniene) en la internulejo-lernejo de Šalčininkai (instruisto L. Sobanskiĵ), en la meza lernejo de Krétinga (instruistino I. Oziŭniene), tiu de Saldŭtiškis (instruisto K. Lukoŝeviĉius) k. á. La lernantoj korespondas kun multaj landoj de la mondo, interŝanĝas suvenirojn, rimedojn por lernado. Tiamaniere ili plivastigas sian horizonton, pli bone ellernas geografion kaj historion de diversaj landoj. En kelkaj lernejoj oni aranĝis specialajn vitrinojn por la eksterlandaj materialoj, kiuĵn oni ŝanĝas tre ofte, ie, ekz. en Pasvalys, eĉ ĉiusemajne. Tiel vigla estas la interŝanĝo de objektoj kaj, pa-

ralele, de amikeco inter la junaj koroj!

Komence estis granda manko de instruistoj. Helpis la Instituto por Perfektiĝo de Instruistoj, aranĝante Esperanto-kurson por profesiaj instruistoj la someron de 1970 en urbo Trákai. Ĝin finis 38 instruistoj. Dum unu monato ili laboris po 7 horoj ĉiutage kaj atingis sufiĉe bonan scipovon de la lingvo, ebligantan instrui ĝin (konsiderante ilian ĝeneralan pedagogian sperton).

Post unu-du jaroj al tiu grupo de la instruistoj aliĝos absolventoj de Vilnusa Pedagogia Instituto, kie ankaŭ estas enkondukita fakultativa instruado de Esperanto por studentoj. Dum la lernoĵaro 1970/71 tie studis la lingvon 50 studentoj (instruas la sperta esperantisto V. Šilas).

La Internacia Lingvo akiras en litovaj lernejoj ĉiam pli multajn adeptojn inter instruistoj kaj lernantoj.

V. Grigaitis

(El „Horizonto de Soveta Litovio“,
n-ro 21/1971)

MANPREMO KUN HEROA VJETNAMIO

La prezidanto de VPEA delegito al la XIV Kongreso de KPC

Ĝojiga kaj surpriza estis la novaĵo, ke kamarado Nguyen van Kinh, prezidanto de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, vizitis fine de majo Ĉeĥoslovakion. Li, eminenta reprezentanto de sia lando en internacia medio, venis kiel membro de la nordvjetnama delegacio por partopreni la XIV-an Kongreson de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio en Praha. Tial des pli agrable tuŝis nin lia sciigo al k-do Balda, en kiu li esprimis sian deziron renkontiĝi kun delegitaro de la ĉeĥa Esperanto-movado.

Ĵaŭdon la 27-an de majo ni kunvenis en la ambasadejo de VDH. Krom k-do Balda ĉeestis J. Drlik, J. Marik, ing. F. Svitak, J. Tomĉik kaj la subskribinto. Kompreneble, plejparto de niaj demandoj koncentriĝis al la laboro de la vjetnamaj pacbatalantoj, speciale la esperantistoj.

„Ni havas plenan subtenon de la registaro, kiu dungis du oficistojn por la Asocio. Ni nenion devis kotizi“, diras k-do Kinh. Ankaŭ libroeldonado

tre aktive kreskas. Okazas krome regulaj kunvenoj, precipe ĉe gravaj jubileoj. Tamen pro malfacilaj objektiva-kondiĉoj oni ne povas organizi kursojn. . . „Kaj kiamaniere la ĉeĥoslovaj kaj esperantistoj helpu al la justa afero de siaj fratoj en la malproksima lando? La respondo estis konciza: per disvastigo de la vjetnamaj Esperantaj eldonaĵoj kaj informado al la publiko pri la sindefenda batalo de la vjetnama popolo kontraŭ la usona agreso.

Esperantisto de post 1931, s-ano Kinh rememoras pri siaj kontaktoj kun la ĉs. samideanoj. Ili komenciĝis jam post la dua mondmilito, kiam la organo de EAĈSR „Esperantisto“ (n-ro 10/1950) aperigis lian leteron, kiu estis sekrete portita centojn da kilometroj tra ĝangaloj kaj postenoj de la franca kolonia armeo. La mesaĝo alportis tiam salutojn de vjetnamaj esperantistoj batalantaj kun sia popolo por liberigo, kaj petis pri simila helpo, kian ni do-

(Daŭrigo suz p. 15)

F. Engels, homo kun vasta erudicio, interesiĝis pri historio, literaturo, biologiaj sciencoj kaj analizis ilin surbaze de la dialektiko. Li multe laboris ankaŭ en la lingvoesplorado. Engels estis poligloto en reala senco de la vorto. Li brile scipovis pli ol dudek modernajn kaj antikvajn lingvojn, inter ili ankaŭ la rusan. Engels bone komprenis la bazajn problemojn de la lingvistiko, mirinde orientiĝis en la tiutempaj lingvistikaj fludirektoj, diligente studis koncernan literaturon, precipe en la sfero de la kompara gramatiko de ĝermanaj, romanaj kaj slavaj lingvoj.

Eĉ en siaj historiaj verkoj F. Engels ofte uzas lingvistikan materialon. En la verko „Origino de la familio, la privata propraĵo kaj la ŝtato“ ni diversloke trovas argumentojn, apogitajn sur lingvaj faktoj. K. Marx turnadis sinkun demandoj pri apartaj lingvoj kaj lingvaj fenomenoj al F. Engels kiel al „esploristo-specialisto en la sfero de la kompara lingvistiko“.

En la verko „Franka dialekto“ F. Engels solvis unu el la plej komplikaj demandoj de la ĝermanistiko — pri la historia sorto de la franka dialekto kaj ĝia loko inter la aliaj ĝermanaj dialektoj. Post diligenta analizo de literaturaj fontoj kaj memstara toponimia kaj dialektologia esplorado F. Engels faris konkludon, tute kontraŭan al la konceptoj de la jungramatikistoj, reprezentantoj de la tiutempa burĝa lingvistiko. La jungramatikistoj asertis, ke la tuta historio de la lingvo estas sub influo de la leĝo pri analogio de „spontanaj“ sonoj kaj psikaj faktoroj. La verko de Engels konfirmis la pravecon de la penso, esprimita de li jam en „Anti-Düring“, ke lingvo evoluas laŭ la leĝoj de l' historia materialismo. La „Franka dialekto“ havis gravan influon al la plua evoluo de la marksisma lingvistiko.

La lingvistikaj konceptoj de F. Engels

ne perdis aktualecon ĝis hodiaŭ; ili gravas ankaŭ por esperantistoj. F. Engels en kunlaboro kun K. Marx, en la verko „Germana ideologio“ vidigis, ke la naciaj lingvoj aperis ne spontane, sed sub la influo de la transformiĝoj de l' homa socio. „La natura lingva kreskado, cetere en ĉiu moderna evoluanta lingvo, leviĝis al nacia lingvo parte per historia evoluo de lingvo el antaŭe trovita materialo, kiel tio okazis ĉe romanaj kaj germanaj lingvoj; parte per kruciĝo kaj miksiĝo de nacioj, kiel ĉe la angla; parte per koncentriĝo de dialektoj interne de unu nacio surbaze de ekonomia kaj politika koncentriĝo. Ke la individuoj siatempe ankaŭ tiun ĉi faritaĵon de la homa gento prenos sub sia absoluta kontrolo, estas memkompreneble“. (K. Marx, F. Engels, Werke, Dietz Verlag, Berlin 1959, Volumo 3, p. 411—412).

Ĉi tiu antaŭvido de la geniaj kreantoj de la socialismo plene konfirmiĝis per la fakto de kreo de la lingvo Esperanto, pruvinta jam per okdekjara praktiko, ke la homa gento vere kapablas krei por sia bezono lingvon, plenumantan ĉiujn funkciojn de „viva“ lingvo. Ni ĝisvivis la epokon, kiam la naciaj lingvoj jam ne povas plene kontentigi niajn bezonojn. La bezonoj de la komunikado inter diversaj, eĉ inter ĉiuj nacioj ekpostulis lingvon internacian, kaj ĝi estis kreita sen atendi la „favoron de la naturo“, la „spontan“ kreigon de internacia lingvo sub la reciproka influo de l' „grandaj“ mond-lingvoj — laŭ hipotezoj de certaj metafizikaj filozofoj. La arte kreita internacia lingvo jam multajn jardekojn servas kaj, konstante evoluate, servos estonte por disvastigo de sciencaj, kulturaj kaj progresivaj pensoj inter la popoloj de la mondo.

A. Skupas
docento de Vilnusa Vincas Kapuskas Universitato. (El „Horizonto de Soveta Litovio“, n-ro 2/1971)



PRELEGOJ PRI LA VERKARO DE MARJORIE BOULTON

En junio ĉ. j. s-anino Rajna Konstantinova prelegis dufoje pri la verkaro de la elstara E-poetino kaj verkistino M. Boulton.

En kunveno de la sofia E-societo „Maksim Gorkij“ ŝi parolis pri la dramoj de Boulton kaj en kunveno de la sofia grupo de filologoj-esperantistoj — pri la poezio de Boulton. Ambaŭ prelegoj vekis grandan intereson pri la verkaro de M. Boulton. La publiko insistis, ke okazu novaj prelegoj — pri la beletristiko kaj pri la stilo kaj la vortfarado ĉe M. Boulton. S-anino Konstantinova promesis prepari tiajn prelegojn pri sia amata poetino, kiujn ŝi tralegos dum la venonta aŭtuno.

K. V.

MARJORIE BOULTON

*„La literaturo estas arto
krei belon per vortoj“*

Tiun ĉi arton majstras la eminenta Esperanto-poetino kaj verkistino Marjorie Boulton (Marjori Boltan). Komence ŝi verkis en sia gepatra lingvo (la angla), ankaŭ multe tradukis en tiun ĉi lingvon, sed ellerninte Esperanton en 1949, Boulton komencis preferi verki en ĝi.

Antaŭ pli ol 80 jaroj Zamenhof donis ekzemplon, kiel majstre oni povas uzi la elementojn de la lingvo por atingi belan kaj vivplenan esprimadon de

nis al hispanoj, ĉinoj, grekoj kontraŭ faŝistoj.

Kiel iama ambasadoro de Vjetnama Demokratia Respubliko en Moskvo k-do Kinh regas krom Esperanto ankaŭ la rusan kaj francan lingvojn.

K-do Nguyen van Kinh promesis al mi intervjuon por la ĵurnalo „PRACE“, kondiĉe ke oni mencios, ke ĝi okazis en la internacia lingvo. Estis vere agrebla plenumi tiun ĉi deziron kaj avantaĝe por nia afero. La intervjuo aperis intertempe la 3-an de junio.

Post naŭdekminuta diskuto oni reciprokas sin per donacoj. Ankoraŭ unu manpremo kun la ĉiam ridetanta kamarado. Ĉu ni renkontigos ankoraŭ? Eble iam, en la liberigita kaj unuigita lando Vjetnamio.

Oldřich Knichal
(El „Starto“ № 4/1971)



M. Boulton

pensoj, sentoj kaj emocioj en literatura kreado. Ĉiu periodo en la evoluo de Esperanto kreis aron da verkistoj kaj poetoj, kiuj plivastigis la eblecojn de la lingvo konsidere al la kombineblo de ĝiaj elementoj. El tio rezultis ĉiam pli granda leksika riĉiĝo.

Marjorie Boulton apartenas al la nova plejado de talentaj verkistoj, kiuj post la Dua Mondmilito daŭrigis la perfektigon de la lingvo per siaj artliteraturaj verkoj. Ŝi dotis la Esperanto-literaturon per rimarkindaj verkoj el la ĝenroj de poezio, beletra prozo kaj dramo. Ekde 1955 ŝi verkis „Kontralte“, „Eroj“, „Cent ĝojkantoj“ (poezio); „Kvarpieda kamarado“, „Dekdu piedetoj (humoraĵoj)“, „Virino ĉe la landlimo“ kaj „Nia sango“ (dramoj); ampleksan biografion de Zamenhof en angla lingvo kaj en Esperanto kaj plurajn artikolojn pri aktualaj temoj kaj pri literaturo; novelaron „Okuloj“.

La plej preferata tereno de M. Boulton estas la poezio, al kiu ŝi dediĉis la pli grandan parton de sia amleksa verkaro. „Kontralte“ estas precipe virina verko, enhavanta lirikajn poemojn, el kies pritrakto videbliĝas la virina

vidpunkto. La volumeton „Cent ĝojkantoj“ oni taksas kiel malgrandan sensacion el poeziaj juveloj. Laŭ la poetino mem, la celo de tiu verko estas „helpi al siaj homaj gefratoj konscii pli pri siaj grandaj kaj malgrandaj ĝojoj, ĝis ĝojo almenaŭ pli ol doloro abundos“. Oni ne preterpasu la bagatelojn nerimarkitaj, ĉar

. . . ili konstruas sian roksurrokan digon kontraŭ koleroj, timoj kaj kvereloj, kaj ĉiutage la frivolaj beloj por plua tago venkas sindronigon. . .

Gravan signifon por nia Esperantoliteraturo havas la poemaro „Eroj“, kiu tuŝas multajn aktualajn problemojn. La poetino kondamnas perforton, agreson, malrespekton al fundamentaj homaj rajtoj. Ŝi kuraĝe kritikas la konservativecon de sia medio, prikantas la amon al la tuta homaro, al la naturo, al patrino, al bestoj, sed la plejmulto de ŝiaj poeziaĵoj estas dediĉitaj al la preferata homo. La destinton de la poeto ŝi vidas jene:

. . . (Li) rekompence kaj redaŭre fortigas Vivon kontraŭ Morto.

Li — ĉies frat', terure sola, servanto de la Krea Verbo — kiel la herb' malforta, mola

— kaj vivpotenca kiel herbo! . . .

(El „Destino de l'poeto“)

* * *
. . . La steloj ne lumadas por si mem — ili radias. Kaj l'anim' genia lumas per ĉiu bildo aŭ poem' . . .

(El „La naskiĝo de geniulo“)

* * *
. . . Almenaŭ tiuj, kiuj plej ĉagrenas la homojn — ni ne estu! Estu ni, ĉe kiuj kelkaj dum sufer' havenas . . .

(El „Provizore“)

Ŝi simpatias al la persekutata kaj senrajtigita nigra raso, kiu tamen „restas nobla, glora, kleriĝemas“. En „Eroj“ 24 versaĵoj estas dediĉitaj al famaj Esperanto-poetoj kaj aktivuloj.

Ankaŭ en la drama ĝenro M. Boulton atingas sukcesojn neignorindajn. La volumo „Virino ĉe la landlimo“ enhavas 15 unuaktajn drametojn, skeĉojn, dialogojn k. a. Kvankam ili ne estas ĝustaj dramoj, sed mallongaj epizodoj, donitaj en dialoga formo, ili

estas tre valoraj (kaj utilaj) por la esperantistoj. La plimulto de ili estas premiitaj en diversaj festivaloj, belartaj konkursoj ktp. Ili tuŝas gravajn problemojn (devo, amo, milito, paco, postuloj de vera instruisto, neceso de lingva perfektigo k. a.). La aŭtorino mem konfesas, ke ŝi verkis ilin pli kiel esperantisto, ol kiel verkisto; ĉar por el-lerni lingvon, oni devas multe legi, kaj por flue paroli, utile estas laŭtlegi kaj fiksi multon en la memoro. La plimulto el la drametoj temas pri la vivo de esperantistoj.

M. Boulton sukcese verkas ankaŭ en la tereno de beletristiko. Ŝia novelaro „Okuloj“ enhavas interesajn, bonstilajn, edifajn novelojn kun tragikaj, spritaj, psikologiaj kaj fantaziaj motivoj; verkitaj en senriproĉa, facile legebla Esperanto, libera de naciismoj, ili kaptas tuj la legantojn.

Tre grava estas la merito de nia eminenta samideanino en la sfero de la vortfarado. Ŝia kapablo tiurilata ebligas al ŝi ĝustan esprimon de ŝiaj sentoj, ideoj kaj konceptoj. Ŝi majstre aplikas la principojn de neceso kaj sufiĉo kaj brile pravas, ke Esperanto povas atingi pli riĉan esprimaron ne per enŝovo de novaj radikoj, sed utiligante la eblojn por kombinado de ĝiaj gramatikaj kaj leksikaj elementoj, verbigado de substantivaj kaj adjektivaj radikoj kaj inverse, laŭ kiu vojo ofte estas atingeblaj precizaj kaj fajnaj esprimoj. Kaj tiuj eblecoj estas neelĉerpeblaj.

M. Boulton diras, ke dum ŝi en sia verkado serĉas sian propran memon, ŝi duonkonscie serĉas ion, kio estas valida por ĉiuj homoj. Ŝi estas kontenta, ke ŝi sukcesas per sia propra sincereco konsoli kaj fortigi aliajn, kiuj baraktas en la sama komplika homa situacio, kaj aparte kontenta ŝi estas farante tion per lingvo tiel forte ligita al altaj homaj kaj konstruaj idealoj, nome per Esperanto.

Rajna Konstantnova



de Asen Grigorov

„Bulgara Esperantisto“



Ekde nun ĉiujare la duobla N7—7 aperes kun „Literatura Bulgara Esperantisto.“

Ĉi-foje ni prezentas al vi membrojn de la Literatura Rondo en Sofio, gvidata de s-ano Asen Grigorov (escepte des-ano St. Kiragiev, kiu ne membras en la Rondo).

La Redakcio

* Ĉatkal, rivero, kiu fontas el la okcidenta parto de la montaro Tjanj-Ŝanj en la Uzbeka kaj la Kirgiza Sovetaj Socialismaj Respublikoj (Mez-Azio).

** Basmaĉo — apartenanto al kontraŭrevolucia naciista movado, kiu aplikis formojn de politika banditismo kontraŭ la soveta ŝtata povo en Mez-Azio en 1917—1926. La basmaĉaro estis likvidita per la aktiva helpo de la laboruloj en Mez-Azio.

Fluas ŝaŭme mirinda rivero Ĉatkal,
potencega montara torento.
La vespero ĝin kovras per blua vual'.
Min ensorĉas Ĉatkala legendo.

Verdaj ondoj impetas en tiu ĉi val',
kaj rebrilas la akvo smeralde.
Kaj rakontas la rava rivero Ĉatkal
kaj de ŝtono al ston' kuras salte.

Ĝi rakontas en tiu viola vesper'
pri delonge pasintaj epokoj.
Mi sorĉite aŭskultas kun kora tener',
kaj aŭskultas kun mi la montrokoj.

... En la vala profund' antaŭ multe da
temp'
rajdis juna bravulo-uzbeko.
Lin kun miro rigardis en muta silent'
el la alto la ŝtona montego.

Li galopis sur blanka impeta ĉeval'.
kaj fajreris la hufoj el fero.
Lin per plaŭdo aplaŭdis smeralda Ĉatkal,
kaj karesis la blua vespero.

La bravulo kolektis taĉmenton kaj mem
ĝin kondukis en arda batalo
kontraŭ aĉa basmaĉa** kruela subprem'
por libero de sia Ĉatkalo.

La junulo uzbeka en sanga batal'
sur la monto pereis heroe,
kaj nun kantas pri li la mirinda Ĉatkal,
kaj kunkantas la montoj milfoje.

La bravulon memoras Ĉatkala montar',
kaj sin portas mirinda legendo:
ke dumnokte li rajdas sur blanka ĉeval'
rapidege, simile al vento.

Li batalas sentime por sia Ĉatkal,
kaj venkite forkuras tiranoj,
kaj tintadas brilantaj armiloj el ŝtal',
venke krias la bravaj montanoj.

... Ŝaŭme fluas kaj bruas la verda Ĉatkal
en la hor' de l' vespera silento.
La krepusko ĝin kovras per blua vual'.
Min ensorĉas mirinda legendo.



LETERO AL USONA PATRINO

de *Ljuba Bojaĝieva*

Usona patrino!

Jam estas malfrue por ĝemi vekrie,
por verŝi torenton da larmoj angore
kaj bati la bruston dolore. . .

Via filo kara,
ame dorlotata,
filo ununura,
de vi adorata,
kuŝas nun senvorte en terkavo — morta,
kaj al vi neniam li revenos plu. . .

Kial li fordonis sian vivon junan?
Pro kio li iris tiel malproksimen
al la fremda tero, al Vjetnamio?

Ĉu inventi tie ion nekonatan
por prosper' homara?
Aŭ eble eltrovi certan kuracilon
por savi la homojn de malsan' danĝera?
Aŭ li iris helpe al la loĝantaro
por ĝin feliĉigi?

Ne!
Li iris tien kiel dungmurdisto,
por murdi kruele.

senindulge,
krime,

murdi infanetojn
virinojn kadukajn,
murdi eĉ la feton en patrina sino!

Nun li trovis tion,
kion li deziris kaŭzadi senpune
al popolo brava
ŝatanta la vivon!

Ĉu tre suferiga estas la angoro
pro la morta filo?

Sed
ĉu vi ne konsciis, ke irante tien
li plorigos vee aliajn patrinojn
alportante morton?

Sensignifa, falsa
sentis vi, sendube,
la fremdan doloron!

Pro kio necesas nun lamentoj ploraj,
ĉagrenplenaj ĝemoj, veoj senkonsolaj?
Vi lin adiaŭis
kun floroj, bukedoj,
benis lin reveni kiel konkeranto,
anŝtataŭ haltigi la ekveturantan
plenan vagonaron
per brusto flamanta,
kiel iam faris la brava francino
Raymonda Dienne!

Se vi volas, tamen, lavi la makulon
de l'memor' malglora,
markinta la nomon de la pereinto, —
ne en la preĝejon faru rekviemon,
nek petu indulgon
de dio venĝema. . .

Jru al la homoj, al soldatpatrinoj,
kies filoj iros nun en Vjetnamion.
Rakontu elkore pri la malhonoro
de la morta filo
kaj instigu ilin
fari tion, kion

vi ne faris tiam —
por savi la siajn!

Al vi nekonata bulgara patrino.

Sofio, en februaro 1971





DIMITROV-MAŬZOLEO
de *Stoian Kostadinov*

Pri ĝi oni povas diri: raraĵo, eksterordinara. interesa maŭzoleo. Ĝi estis konstruita dum sep tagnoktoj — kio estas unika en nia lando, kaj ne nur en ĝi. Simpla konstruaĵo, sed vi ne povas eniri ĝin trankvila. . .

Silento, nenia bruoj, nek rapideco.

Mi estas unu el la multaj, kiuj malrapide paŝas tra ia nelongaj, sed kvazaŭ senfinaj marmoraj koridoroj. . .

Kiam li aperos? Kiam mi vidos la ripozantan Dimitrov?

Mi deziras rapidi, eĉ flugi, sed malgraŭ tio ia nevidebla forto igas min esti unu el la multaj, unu el la vico. Malrapide, silente kaj pacience mi pasas kiel ĉiuj pasantoj antaŭ kaj post mi.

Jen fine la halo. Mi vidas Dimitrov. . . La homon, kiu estigis ribelojn. La homon, kiu instigis la mondon al ribelo por pli da pano kaj libero. La homon, kiu gvidis tiajn ribelojn. La homon, kiu sukcesis stopi la plej fian inter la fiaj buŝon de la faŝismo. La heroon de Leipzig. . .

Nun li kviete ripozas. . .

Kviete?! Ĉu povas kviete ripozi la viro, sub kies gvido milionoj ribelis? Ĉu povas kviete ripozi la viro, kies nomo eĉ post la morto mobilizas mi-

lionsojn da homoj al batalo por justeco kaj feliĉo? Ĉu povas esti kvietaj kaj mortaj la homoj, kiuj eĉ post sia morto gvidas la popolamasojn al batalo por libero?!

„Ja kiu falas por la libero mortas neniam. . .“

Jes, Dimitrov ne mortas. Li falis en la batalo, li efektive forbrulis en la batalo — kaj pro tio li ne mortas! Li pli ol kiam ajn estas nun viva! . . . Li gvidas la bulgarajn popolamasojn al batalo por prospero, socialismo, komunismo. . .

Silento, plena, universala silento. . .

Ĉu mi estas sola en la halo? Ne, ĝi estas plenplena de vizitantoj. Dimitrov ankaŭ estas en ĝi. Li ŝajne dormas. Neniu vorto, neniuj bruoj. Mi fiksas rigardon al li.

Li kviete ripozas. . .

Jes, kviete — en la maŭzoleo, sed ne en la vivo! Tie li estis unua inter la unuaj. Li estis nia gvidanto al eterna amikeco kun USSR, al paco, al libero, al socialismo, al komunismo! . . .

Subite mi troviĝis antaŭ la elirejo. Paŝon, du — kaj malaperis la mirinda mondo de la Dimitrov-ripozejo. Mi troviĝis ekster la maŭzoleo.

La suno brile lumas. Sur la proksimaj grandaj ulmoj pepas birdoj. De la placo aŭdiĝas la konata urba bruoj. La vivo fluas — la vivo gvidata de Dimitrov pere de nia Dimitrova Komunista Partio!

[POR LA UNUA FOJO]

de *Nevena Nedelčeva*

Por la unua fojo la malsanuloj ne obeis, ne volis iri al siaj ĉambroj. Vestite en kiteloj, ili amasiĝis en la koridoroj. Iuj flustris unu al alia kapo-ĉekape, aliaj staris silente, okulfiksante la blankan pordon en la koridorfundo. Eĉ la plej grave malsanaj penis ellitiĝi, aŭ, se ili ne povis fari tion, levis la kapojn por vidi iun kaj demandi pri la stato de d-ro Prodanov. Kvazaŭ

ĉiuj estis forgesintaj la dolorojn, la vundojn, kaj vane la rapidantaj medicinaj fratinoj igis ilin enlitiĝi. La flegistinoj rapide servis iun grave malsanan kaj per senbruaĵ, kuretantaj paŝoj direktiĝis al la koridoro, kie ili gluiĝis al la muro, proksime de la blanka pordo. . .

Grupo da malsanulinoj el ĉambro № 6, senfortiĝintaj pro la longdaŭra starado, eniris por sidiĝi dum kelke da minutoj.

— Kiel li fartas? — renkontis ilin la pro sufero larĝigita rigardo de Zora, kiun antaŭ ses tagoj d-ro Prodanov estis operaciinta; al ŝi oni absolute malpermesis moviĝi de sur la lito.

— Kiel li fartas! — respondis la unua el la malsanulinoj, enirintaj la ĉambron. — Malprudenta homo! . . Certe li mortos. . . kaj kion ni faros poste?

— Se temus nur pri ni, — aldonis alia, — la damaĝo ne estus granda. Baldaŭ ni estos hejme. Sed la aliaj, kies vivo estas en mortdanĝero?

— Oni diras, ke lia edzino ne volis lasi lin eliri. Ŝi lin ŝlosis, sed nenio povis haltigi lin veni ĉi tien.

— Nu, kaj poste? — kun kapo levita el la lito demandis Zora.

— Kaj poste. . . operaciinte la infanon, li ridetis kaj tuj falis en sinkopo sur la seĝon.

— Oni nun devas fikse ligi lin al la lito kaj ĝis lia plena resaniĝo ne lasi lin ellitiĝi.

— Se li restos viva. . .

— Kio? — leviĝis el la lito la laboristino Liljana. — Ĉu li ne restos vivanta?

— Tuj kuŝigu! — riproĉis ŝin unu el la malsanulinoj. — D-ro Prodanov ordonis al vi kuŝi senmove.

— Kuŝi! . . Dum li estas mortanta tie transe!

Iuj el la malsanulinoj eliris.

— Stranga homo! — komentis la ceteraj, sidantaj sur la litoj. — Oni povas esti tre kuraĝa, sed leviĝi el la lito kaj veni kun tiom alta tempera-

turo. . .

— Kaj kiu permesis al ili voki lin per telefono?

— Li ordonis tiel. . . Ke oni voku lin en ĉiu urĝa okazo. Krome, oni ne sciis, ke li fartas tiel malbone.

— Kaj ĉu ja oni ne vidis lian staton antaŭhierau, kiam li venis por tiu knabo, kiun oni piedpuŝis ĉe la ventro?

Oni eksilentis, ne sciante kion diri. Se li ne estus veninta, la knabo estus jam mortinta. Liaj kamaradoj alportis lin. Ili piedpilkis. Kiam la malfeliĉo devas veni, ĝi tiel venas. . . neaten-dite. La knabo, kiu piedpuŝis lin, plo-regis! Ili estis bonaj kamaradetoj. . .

D-ro Mladenov ekzamenas lin, de ekstere — neniu korpodifekto. Sed la knabo senkonsciigis. Oni injektas lin, tamen li fartas ĉiam pli malbone. La stato estiĝas ege maltrankviliga. . . La knabo perdas la fortojn, estingiĝas. Oni tuj telefonas al d-ro Prodanov. Li estas malsana, sed oni scias, ke nur li povas savi la knabon.

Li venas, palpesploras la ventron. Tuja operacio. . . La juna vivo estas savita. La doktoro revenas laca, kun temperaturo, sed kontenta.

— Kaj li, kvankam li estas doktoro, tamen neglektas sian sanon kaj malvarmumas — diras malkontente iu el la malsanulinoj.

— Malvarmumas. . . Sed la juna kuracisto el vilaĝo Kruŝevica ja vokis lin urĝe por konsulto. Li atingis Momi-na Poljana per veturilo, kaj de tie sur la krutaĵo per ĉevalo. Laŭ la kalendaro estas majo, sed ekneĝis. . . kaj la homo malvarmumis.

— Kvazaŭ ne ekzistas aliaj kuracistoj, ĝuste lin oni devis voki! — la unua virino malserene kuntiris la lipojn.

— Kaj kial do vi ne lasis vin operacii de alia kuracisto?

Oni denove eksilentis. Doktoro Prodanov estis severa, ne parolema homo. Ĉiuj timis lin — kaj malsanuloj, kaj medicina personaro, sed ĉiuj kun plena fido lasis sin al liaj manoj



por esti kuracataj. La junaj kuracistoj adoris lin, liaj kolegoj konsultis lin.

— Kapabla, — ĉiuj diris, — naskita kuracisto, kiel estas naskitaj muzikistoj, pentristoj.

— Ho! . . . Mi ne povas resti tran- kvile kuŝanta, — leviĝis unu el la lito. Mi eliros.

— Ankaŭ ni eliros! — stariĝis ĉiuj.

— Restu ĉi tie. — Zora direktis al ili siajn okulojn largigitajn kaj plenajn de brilo pro la sufero.

— Ni denove revenos!

Zora sopirĝemis kaj mallevis la kapon sur la kuseno. Ŝi ne sciis, kion pensi. Estus bone, se d-ro Prodanov ne estus veninta, sed la infano? Ne horoj, sed minutoj, oni diris, estis fatalaj por la infana vivo.

La urbeto kuŝis en la sino de la montaro, sed la famo pri la kapabloj de la severa kuracisto jam delonge disvastiĝis en proksimaj kaj malproksimaj vilaĝoj kaj igis la homojn transpaŝi la sojlon de la malsanulejo kun la certeco, ke oni helpos ilin, ke ili estos resanigitaj.

La malsanuloj en la koridoro per senbrujaj paŝoj proksimiĝis al la blanka pordo de la koridorfundo. La viroj silentis, nur spiris profunde.

La virinoj interflustris.

— Mi malfermos, mi ne povas plu, — diris Dafina, 19-jara junulino kun bandaĝita kapo. — Mia koro krevos.

— Iru kuŝiĝi! — ekflustris al ŝi severe grandaĝa malsanulino.

— Kuŝiĝi! — rediris kolere Dafina. — Prefere mi mortos sur lia sojlo, ol en la lito. — Mi malfermos.

La malsanuloj okulfiksis ŝin. Ĉu nur ŝi volis malfermi la pordon? La deziro de ĉiuj vidi, kio okazas al la kuracisto, superverŝis la koron de la junulino, kaj ŝi per tremanta mano premis la tenilon kaj senbrue malfermis la pordon.

La malsanuloj restis kvazaŭ alnajlitaj antaŭ la pordo, sed poste, vidante, ke d-ro Mladenov kaj la medicinaj fratinaj ne rimarkis ilin, tute silente, mal-

rapide, paŝo post paŝo eniris la operaciejon. Regis absoluta silento. D-ro Mladenov ekzamenis la pulson de d-ro Prodanov. La fratino kliniĝis por injekti lin. Sed d-ro Mladenov laŭ ia neklarigebla maniero eksentis, ke io neordinara okazas en la ĉambro, kaj turniĝis.

— Kial vi venis ĉi tien? — kolere, sed mallaŭte li demandis ilin. — Iru al viaj ĉambroj!

Ŝajne neniu aŭdis lin. Male, la malsanuloj alpaŝis pli proksimen al la interno de la ĉambro, leviĝis sur la piedfingroj, streĉis la kolojn, ĝis fine atingis tute proksime la kuŝantan kuraciston.

D-ro Mladenov volis riproĉi ilin, devigi ilin reiri al siaj ĉambroj, sed renkontinte la rigardon de iliaj okuloj, restis fikse staranta. . . poste mallevis la kapon. Tiuj rigardoj, tiuj okuloj plenaj de zorgo, sufero, amo, decidemo. . . ili ne cedos.

Neatendite d-ro Prodanov ekspiris profunde unu fojon, duan fojon, trian fojon. . . kaj malfermis la okulojn.

La malsanuloj tute proksime kaj fikse rigardis lin.

Iom post iom, malrapide, la konscio reaperis en la okuloj de la kuracisto, kaj li ĵetis miroplenan rigardon ĉirkaŭ si. Plej proksime staris la juna monta ŝafisto apogite sur siaj lambastonoj, apude — la maljuna Lada, kies koron oni konstante subtenis per injektoj. Vidalvide staris Dafina, apud ŝi aliaj kaj aliaj, homo ĉe homo, kapo ĉe kapo.

— Kial vi estas ĉi tie? — demandis d-ro Prodanov kaj provis leviĝi.

— Restu kuŝanta! Vi ne devas leviĝi! — per siaj tremantaj manoj la maljuna Lada premis lin al la lito.

— Kio okazis al vi? — konsternite rigardis ilin la malsana kuracisto, kaj tiam li vidis, ke el la okuloj de ĉiuj gutas larmoj.

— Kial? Kial? — li demandis sin nekomprene. Sed la okuloj, en kiuj perlis larmoj, ridetis, la koroj spiris facilite.

— Iru al viaj litoj! — mallaŭte flu-



ELREVIĜO de Prodan Prodanov

En la nesufiĉe plena aŭtobuso veturis juna patrino kun sia infano, eta knabineto. Antaŭ ili estis ligna infansledo. Sur ĝi — lana dormkovrilo kaj mezgranda leda valizo.

La juna patrino estis en aĝo floranta kaj neordinara belulino. Ŝiaj delikate mildaj trajtoj altiris ĉies atenton. Ridkavoj ornamis ŝiajn rozblankajn vangojn. Dentaĵo — perloj! Okuloj — brilantoj!

Kontraŭ ŝi sidis Dikanski, viro en solida aĝo, jam arĝenthara kaj kun junaspekta vizago. Li estis arda turisto.

La tago estis sunbrila. La neĝtavolo — dika. La panoramo, videbla tra la aŭtobusaj fenestroj — plej varia. La neĝokovritaj arboj formis mirindajn, preskaŭ fabelajn figurojn. Vitoŝa monto estis neordinare bela kaj pitoreska.

Dikanski tamen malatentis tion. Liaj okuloj estis kvazaŭ alnajlitaj al la belulino. Li fiksrigardis ŝiajn graciajn bo-

stris d-ro Prodanov. — Iru, dum mi leviĝos por povi viziti vin.

Tiuj, kiuj staris plej proksime de la pordo, turniĝis kaj ekiris al siaj ĉambroj.

tovestitajn krurojn kaj ne povis al ĉirsisian admiroplenan rigardon de ŝi.

La buso atingis la ŝtonriveron „Oraj Pontoj“ kaj haltis. La pasaĝeroj elbusiĝis. Al la bela patrino helpis du junuloj — skiantoj. Unu el ili elportis la valizon, la alia — la sledon. Ŝi dankis afable kaj demandis:

— Kiamaniere mi povus iri al montodomo „Bor“?

— Vi iru nur laŭ la ŝoseo. Ĝi kondukos vin al „Bor“.

La junuloj ekiris, dirinte al ŝi la kutimajn bondezirojn. Dikanski rigardis ŝin plue.

— Tiu ĉarmulino estos mia agrabla vojkunulino! — meditante, li ekmarŝis, ofte sin turnante malantaŭen.

Li intence malrapidigis sian iradon kaj iom post iom ĝisatendis ŝin. La dormkovrilon ŝi estis metinta sur la sledon. Sur ĝi — la infanon. En sia maldekstra mano ŝi tenis la valizon. Per la dekstra tiris la sledon helpe de nelonga ŝnuro.

— Saluton! Donu al mi la ŝnuron! Mi kondukos vin al „Bor“! — li diris serioze kaj etendis sian manon.

— Kiom bonanima vi estas! — ŝi danke diris kaj transdonis al li la ŝnuron.

Post kelke da paŝoj ŝi metis ankaŭ la valizon sur la sledon kaj ekbabilis gaje. Laŭ la ebena parto de la ŝoseo Dikanski heroe tiris la sledon kaj aŭskultis la klarvoĉan paroladon. La belulino plendis pri siaj hejme forgesitaj sunrezistaj okulvitroj. Vere, la sunradioj reflektiĝis de la neĝo kaj brilis blindige. Oni devis nevole palpebrumi.

En tempo nedaŭra dank' al ŝia babilemo Dikanski eksciis kelkajn bagatelojn pri ŝi kaj pri ŝia bopatrino. . .

Dekstre de la vojkurbiĝo rekta aleo trapasas krutan deklivon kaj ŝparas preskaŭ tutan kilometron. Ili devis iri laŭ ĝi.

La patrino devis inviti sian infanon provizore piediri. . . Kaj preni la valizon por iom da tempo. Tamen ŝi ne faris

tion. . . Pro la krutaĵo la ŝarĝo iĝis duoble pli peza. . . Vane li atendis helpon de ŝi. La bela vojkunulino iris facile kvazaŭ dancante kaj „pepis“ plu.

— Panjo, kuru kiel ĉevaleto! — la infano kriis.

— Morgaŭ, birdeto mia! — ŝi respondis.

— Panjo, mi sentas min bonege! — la etulino kontente diris.

— Pri tio vi devas danki al tiu ĉi onklo! Li estas vera montano!

„Se vi prenis la valizon enmane, tio efikus al mi pli bone ol via sen-gusta flataĵo!“ — li pensis amare, tamen ne perfidis siajn pensojn.

Lia spirado iĝis peza. La korbataĵo — tre rapida. Abunda ŝvito kovris lian korpon. Liaj turista jako, bona pulovero kaj dikŝtofa ĉemizo sufokis lin kiel mezepokaj turmentiloj. La vojo iĝis por li vera kalvario.

„Tiu ineto verŝajne pensas, ke mi estas farita el fero, aŭ ke mi estas 20-jaraĝa!“ — Dikanski insultis ŝin en siaj pensoj.

Ili denove atingis la ŝoseon. Dikanski haltis anhelante. Li estis fizike elĉerpita kaj sentis kapturniĝon. . . La situacion li konsideris reale: se tiu facilanima virineto utiligus lin kiel dungitan azenon, lia ekskurso aliformiĝus en torturon. . .

— Mia vojo estas ĝis ĉi tie! — decide mensogis li.

— Kaj mi? — ŝi demandis timeme, kaj ŝia rideto malaperis.

— Nur laŭ la ŝoseo!

— Ĝi ŝajne treege serpentumas! Ĉu ne ekzistas pli rekta vojo?

— Laŭ la ŝoseo vi atingos la celon pli frue! Ĝis revido kaj agrablan ripozon!

Al lia saluto ŝi respondis iel malvarme kaj ektiris la sledon. . .

Longe post tio Dikanski staris surloke, ripozis kaj rigardis ŝian dorson. . .



SONETO

de Todor Ŝoŝev

Treege mi suferas ĉi-vespere
ĉiam sama bild' en rememor':
vi, rigardanta tiel malespere,
parolanta kun premita kor'!

En la rideto via, karulino,
tiom multe da dolor', tristec'!
Multege da sopiroj de knabino
por revata, kara estontec'! . . .

Mi volas teni vin en ĉirkaŭprenon.
Per senfina kis' forsuĉos mi
de la tristeco via la venenon,

ĉar ĝojo via estas mia ĝojo,
mi sen vi ne povas esti mi —
la sama estas nia vivovojo.

DENOVE LA PRINTEMPO VENIS

Denove la printempo venis,
ekbrilis gaje varma sun',
glacio teron malkatenis,
denove regas ĝojo, jun'.

En kampoj flora bonodoro,
ekstaze ĉirpas la birdar'.
Ekĝojas ĉiu homa koro.
Jen rejuniĝis la homar'.

Sed fremda estas al mi ĉio!
Mi ĉiam vivas en aŭtun'!
Krom ŝi ĝojigas min nenio!

Jen forte mia kor' doloras,
por mi ne venis la Fortun',
ne venis la printemp' — ŝi foras!



NIGRULINO

de Penka Batoeva

Ĉu ekzistas inter birdoj sento de granda, pura amo? Ne temas, kompreneble, pri la seksa instinkto, kiu estas ja fiziologia bezono kaj nenio pli.

Jen unu interesa kazo.

Kamaradino Laleva havis kutimon de tempo al tempo aĉeti de la vendoplaco vivajn kokinojn por buĉado. Ŝi loĝis en la centro de la urbo kaj ne posedis korton. Tial ŝi improvizis sur la malantaŭa tegmenta teraso malgrandan kokinkaĝon.

La kokino, kiun ŝi aĉetis tiun ĉi tagon, estis juna, nigra kaj kun brilantaj plumoj, kun eleganta malgranda kapeto kaj fajnaj piedoj. Malgraŭ ke estis kokino, ŝi diferenciĝis disde la aliaj. Ja ĉiuj kokinoj ne estas egalaj, samkiel la homoj. Inter ili estas plej diversaj laŭ fizionomio, kresto, piedoj kaj eĉ karakteroj.

La ĵus aĉetita estis kvietita, pacema kaj jam en la unua tago metis ovon.

Al la infanoj de Laleva plaĉis la nova gasto, kaj ili tuj donis al ĝi la nomon „Nigrulino“.

La infanoj zorgis pri ŝi, enverŝis akvon, proponis defalaĵojn el la kuirejo kaj tre, tre ĝojis pri ŝi.

Tiel pasis kelkaj tagoj.

La patrino decidis buĉi la kokinon, sed la infanoj ekploris, kaj Laleva, surprizita de la alarmo, lasis la kokinon vivi.

Forpasis la somero, dum kiu la kokino demetis ĉiun tagon po unu ovo.

Ekblovis malvarmeta aŭtuna vento.

La infanoj maltrankviliĝis — Nigrulino frostiĝos.

Sub la longa viziero de la tegmento la infanoj zorge konstruis varman vintran kokejon.

Vespere ili donis al la kokino grenajn aŭ maizajn grajnoj, por ke la nutraĵo en ĝia kropeto ne glaciĝu. Matene ili miksis branon aŭ preparis pankacon kun varmeta akvo.

Tiel Nigrulino vivis sian kvietan kaj satan vivon.

— Forpasis unu jaro. Forflugis dua. La infanoj ne forlasis sian kokinon.

Kvar jarojn travivis Nigrulino sur la kvietita teraso.

Sia loĝejo estis kun planko el belaj kaheloj ĉiam lavitaj, kun situo sudokcidenta — vera sanatorio. Tamen malgraŭ tio la birdo komencis senplumiĝi. Iom post iom ŝi estiĝis ridinda — malbela, kompatinda. Fine ŝi tute senplumiĝis. Poste elkreskis novaj plumoj, sed maldensaj kaj blankaj.

Nigrulino maljuniĝis. Ŝia kresto tute paliĝis. Ŝiajn fajnajn piedojn kovris dika, skvama haŭto. Ŝi fariĝis mallerta kaj eĉ nervema. Jam delonge ŝi ne demetis ovojn. Kaj tute ne estis uzebla por manĝado. Oni lasis ŝin ĝisvivi siajn tagojn.

Dume Laleva aĉetadis nur buĉitajn kokinojn el la viandvendejo.

Tamen iun tagon ŝi aĉetis de la bazaro vivantan koketon. Li estis ankoraŭ malgranda, kaj Laleva loĝigis lin en la kokejo por iomete grasigi lin.

La maljuna kokino, kutimiĝinta al trankvileco, jam fariĝis malsocietema kaj granda egoisto. Ŝi ne permesis al la koketo beki eĉ unu grajneton el la nutraĵo. La kokino frapis lin, kaj li —





LA SINO FERO
de Miĥail Ŝekerĝiev

En trankvila aŭgusta vespero mi kun miaj gastoj el Svedujo ripozis sur benko apud la maro kaj ĝuis la lun-reflektiĝon sur la mara surfaco. Tie la marbordo estas alta kaj imponigas la panoramon. En la maro mem, ne malproksime de la bordo, malhele konturigas granda roko, kaj la pejzaĝo estiĝas ankoraŭ pli bela. Ĉiuj meditis. Subite mi rompis la silenton.

— Ĉu vi scias, kio okazis antaŭ du jaroj ĉirkaŭ tiu roko?

Sen atendi respondon, mi ekrakontis: Estis varma somera posttagmezo. La

maro estis glata, la somerumantoj zumis kiel abeloj sur la strando, ankaŭ en la marakvo. Gaja bruo ŝvebis tra la spaco. Sed subite ekblovis forta suda vento, ekfuriozis forta tempesto. Leviĝis grandaj ondoj, la ĉielo nigriĝis, kaj ekpluvegis.

Dum kelkaj minutoj la plaĝo kaj la maro senhomiĝis. La fiŝkaptistoj urĝe haltis kun siaj barkoj sur la bordon. Sed izolita barko, estante pli malproksime en la maro, malfruis, kaj la grandegaj ondoj ludis per ĝi libere. Post kelkaj minutoj ili frapigis la barkon kontraŭ la rokon, kaj ĝi frakasigis je pecoj. La troviĝanta en la barko fiŝisto saltis en la maron, kriegante por helpo, sed lia voĉo perdiĝis pro la siblado de la vento. Unu en la fiŝistoj el la bordo rimarkis la tragedion, fulmorapide demetis sian ĉemizon kaj, luktante kun la ondegoj, malrapide alproksimiĝis al la dronanto. La dronanto fortike sin tenis ĉe lignopeco de la disbatita barko. Kelkaj fiŝistoj kuraĝige kriis al ambaŭ.

Kiam la savanto alproksimiĝis al la dronanto, tiu ellasis la lignopecon kaj avide kroĉiĝis al la korpo de la savanto. En tiu momento du gigantaj ondoj sinsekve puŝis ambaŭ dronantojn kontraŭ la rokon kaj ili malape-

la kompatinda, kaŝis sin en la plej sendanĝera loko de la kokejo.

Pasis semajno, pasis du semajnoj. La infanoj ne permesis al sia patrino buĉi ankaŭ la koketon.

Pasis du monatoj. Kaj kio okazis dum tiu tempo al la maljuna kokino?

Dum tiuj du monatoj la kokido fariĝis virkoko kaj komencis kokeriki. Post la tria semajno lia voĉo fariĝis raŭka, kaj la triloj flugis jam en la krepusko super la tuta teraso.

La koka kriadado estiĝis pli kaj pli belsona kaj ĉarma, la koketo pli fieraj kaj svelta.

Dume Nigrulino aliĝis, ŝanĝis la maldensan plumaron kaj vestis sin en nova, rezine-nigra plumvestaĵo.

Nigrulino jam neniam plu bekfrapis la koketon, kaj kiam ŝi trovis ion manĝeblan, cedis ĝin al sia kunulo.

Kaj de nun la du birdoj ekvivis en paco kaj feliĉo. Kaj nun okazis vera miraklo — Nigrulino rekomencis demeti ovojn!

Tamen Laleva decidis buĉi la koketon. Al la daŭraj protestoj de la infanoj ŝi respondis: „Mi ne intencas fari zoologian ĝardenon, hodiaŭ vespere mi buĉos la koketon“!

Kaj ŝi buĉis lin.

Kiam matene la infanoj iris por meti matenmanĝon al Nigrulino, ilin surprizis morta silento. Ili trovis la koketon rigida — ŝi estis mortinta en sia kokejo.

ris. Post kelkaj tagoj iliaj kadavroj estis eljetitaj sur la strando, kaj oni enterigis ilin kune. Mi neniam forgesos tion. Post nelonga silento Gunas, sidanta apud mi, malrapide ekparolis:

— Nun mi rakontos al vi alian okazintaĵon. En nia fabriko laboris la tekstisto Aksel, modesta kaj silentema homo. La dekstra duono de lia vizaĝo kaj lakolo estis malbelegitaj pro brulcikatro. Foje, dum la somero, mi vidis lin sur la rivera plaĝo. Kun miro mi konstatis, ke krom la haŭto de liaj vizaĝo kaj koló, estas brulvundita ankaŭ la haŭto de lia dorso. Li invitis min al si kaj ekbabilis. Interalie, kvazaŭ por kontentigi mian kaŝitan scivolemon, li komencis rakonti la jenan historieton:

— Mi laboris en Upsala. Unu vesperon, revenante hejmen, mi rimarkis incendion. Brulegis duetaĝa domo. La flamoj rapide ĉirkaŭkaptis la konstruaĵon el ĉiuj flankoj. Scivolemuloj kolektiĝis ĉirkaŭ la domo kaj svarmis. La fajrobrigado tamen ankoraŭ ne estis veninta. La krakado de la seka ligno intermiksiĝis kun la alarmoplenaj krioj de la publiko. Subite iu ekkriis: „Supre kuŝas la malsana Ingrid, ŝi forbrulos, forbrulos! Estiĝis paniko. La vento disblovas la flamojn kaj la fajrolangoj interplektiĝis kaj fleksiĝante dancis kiel serpentoj super la tegmento. Tiam mi enkuris la brulantan ŝtuparon, rapide prenis la knabinon, sed descendante eksentis, ke mi mem komencis bruli. Mi memoras nur, ke apenaŭ mi sukcesis eliri sur la straton kaj tuj falis teren. Sekvis kuŝado en malsanulejo, longdaŭra kuracado kaj jen, denove mi estas sana.

Gunas finis. Estis jam noktomezo, kaj ni ĉiuj iris hejmen por dormi.

Longan tempon mi ne povis ekdormi. La du historioj pensigis min. Kial inter tiom da fiŝkaptistoj nur unu saltis en la maron? Kial el la scivolema publiko nur unu viro sin ĵetis en la flamojn? Kio igis ilin oferi sin por la aliaj? Kia estas tiu ĉi forto, kiu puŝis ilin al similaj agoj? El kiaj fadenoj

estas teksitaj iliaj animoj?

La brulinta Aksel asocie memorigis al mi pri la sinbruligantaj budanoj en Vjetnamio. Mi rememoris ankaŭ pri la bulgaraj poetoj Botev kaj Vapcarov, kiuj falis en la batalo por la liberigo de nia Patrujo. Kaj ne nur pri ili. Amundsen mortis en la neĝoj, Gjordano Bruno forbrulis sur la brulŝtiparo por la bono de la homaro.

Kio distingis tiujn homojn de la ceteraj? Ĉu iliaj agoj estas heroeco? Jes, mi respondis al mi. Tamen erare estas paroli nur pri heroeco, ĉar ne ĝi estas la fundamenta afero. Soldato faras bravajojn, ĉar oni ordonas al li, laboristo — ĉar oni pagas al li. Sed la sinoferuloj agas tute libere laŭ siaj impulsoj. Por tiuj homoj ekzistas nur unu vero, kaj ili batalas kaj mortas por ĝi. Ili ne demandas, ĉu ili gajnos aŭ perdos. Ili ne serĉas kompensajon, gloron. Ne! La sinofero ne estas hobio, modo, profesio, negoco. Kaj ankoraŭ io. La sinofero ne estas iometo, parto, sed plena kaj sonas kiel potenca akordo. Evidente temas pri io pli delikata, altmoral. En tiu labirinto de pensoj mi daŭrigis mian antaŭeniradon.

La sinofero naskiĝas spontane, ĝi ekmovas la konsciencon de la sinoferanto, kaj lia tuta naturo en subita momento agordiĝas al noblaj agoj. Ofte li subpremas siajn proprajn plorgemojn kaj tamen sin oferas por la komuna afero, por la idealo, por la bono de la ceteraj homoj. La fajro de la sinofero ardas en lia sango kaj neniu povus estingi ĝin.

Tiel rezonis mi, kaj iom post iom antaŭ mi formiĝis la psika portreto de la sinoferulo.

Ne, mi ne povis plu kontraŭstari miajn pensojn, ellitiĝis, lumigis la lampon kaj komencis skribi.

La aŭroro estis lumiginta jam la plej supran parton de la vidalvida konstruaĵo, kiam mi finis. Tiam mi reenlitiĝis kaj ekdormis kontenta, ke mi disfibris kaj komprenis ankoraŭ unu homan veron.





DU HUNDOJ
de Ivan Krilov

La hundo Barabazo, la fidela koro,
Gardisto de la korto de l'sinjoro
(Gficon sian ĉiam plenumante kun fervoro!),
Ekvidis la malnovan sian amikino,
Juĵu, la etan krispulino,
Ĉe la fenestro, sur kuseno mola,
Kaj tuj al ŝi sin ĵetas li feliĉa kaj kaĵola.
Pro kortuŝeco li ne scias kion fari.

Kaj sub fenestro
Samkiel antaŭ sia estro
Boĵetas, sur la kruroj malantaŭaj provas
li ekstari.

„Nu, kiel fartas vi, Juĵunjo,
Post kiam vi la korton ja forlasis,
En kiu, eble vi memoras, ofte ni malsatis,
Kaj certe estas grava la ofico via nuna?“

„Feliĉon plendi—estus peko—grave et-Ju-
junjo ekparolas, —

Sinjoro mia simple min adoras.
Mi vivas en abundo kaj kontento
Kaj manĝas mi kaj trinkas mi en ujoj el

argento.
Mi ludas kun sinjoro mia, kaj se mi laĉiĝas,
Sur la tapiŝoj kaj sur mola sofo mi ruliĝas.

„Sed kiel vivas vi?“ — „Ho, lasu — diris
Barabazo

kun vosto vipe teren kaj kun pendiĝinta
nazo. —

Mi vivas kiel vivis iam.
Suferas mi malvarmon kaj malsaton kiel

ĉiam.
Mi gardas la sinjoran domon per pasio kaj

per dentoj,
Sed mem mi dormas ĉe l'barilo sub la plu-

vo kaj la ventoj.
Kaj se maltrafa estas la bojado

Ne malfruiĝas la batado.



NEATENDITA RENKONTIĜO
de Vesela Ivanova

La horo estis deka kaj duono ves-
pere. La sunradioj ankoraŭ ludis en la
trankvila akvo de Neva.

Ivan haltis por ĝui la ĉarman skul-
ptoarkaĵon de la Vintra Palaco, kaj
la ceteraj ekskursantoj direktis rigar-
dojn al la Petro-Pavlovsk-Fortikaĵo,
kiun ili jam trarigardis.

Magdalena, Nikolaj kaj Ilija rakon-
tis, ke hodiaŭ tagmeze ili venis al la
sama loko ĝuste je la dekdua horo por
aŭdi la pafojn de la fortikaĵo. Laŭ ĝi
antaŭ multaj jaroj oni orientiĝis pri la
tempo. Ĉirkaŭe estis granda vigleco.
Gejunuloj kun gitaroj ludis kaj kantis.
Viroj kaj virinoj promenadis. Aliaj ra-
pidis al siaj laboroj. Ĉiu kun siaj zorgoj.

Subite iu ekkriis:

— Ivan Krâstev el Bulgario!

Sed, kara, kiu estas de sukceso via la sekreto
Estante tiel vi senpova kaj malgranda eto,
Dum estas mi kaj forta, kaj utila, kaj fer-
vora?

Do kia estas la ofico via tiel altvalora?“

„Oficon mian tre valoran scii volas vi?
Sur kruroj malantaŭaj povas paŝi mi“.

* * *

Do multaj la feliĉon nur per tio akiras,
Ke ili sur piedoj siaj malantaŭaj iras.

El rusa; Ljubomir Miĥajlov

La voĉo eksonis kun rusa akcento. Ivan ekstremis kvazaŭ vekiginte el la sonĝo kaj momente sin turnis. Antaŭ li staris svelta kiel arbido ĉirkaŭ dek-sesjara junulino. Granda blonda harplektaĵo estis malzorge transĵetita dekstraflanke kaj falis sur ŝia belega brusto ĝis la zono. Du mirinde belaj okuloj, bluaj kiel la koloro de la cejano, ornamis ŝian anĝelan vizaĝon.

— De kie vi konas min — mirigite demandis li.

La junulino eviteme kaj ŝerce respondis:

— „Ho, dio mia! Ĉu vi de la ĉielo falis, aŭ mi troviĝas en la paradizo?“ — diris Eleonora al Trobadoro el la opero.

— Trobadoro de Verdi. Sed vere, ne ŝercu, de kie vi konas min?

— Laŭ la Esperanta insigno.

— Mi estis dorse al vi.

— Ne ĝuste dorse, mi vidis vian profilon. Sur la foto vi estas tute la sama.

— Mi nenion komprenas, — respondis Ivan Krâstev, kiu estis laŭnesce serioza.

— Vi estas juristo, ĉu ne?

— Jes. Sed kiu vi estas?

— Ĉu vi havas amikon en Moskvo?

— Doktoron Aleksandr Serafimoviĉ, unu el miaj plej bonaj korespondantoj.

— Mi estas lia nepino. Mia avo sendis al vi mian foton kaj vi donacis al mi blankan skarpon, ĉapeleton kaj gantojn el angora lano.

— Maŝenka, — ĝoje ekkriis Ivan. — Sed vi ja kreskis tre granda dum kvar jaroj. Kia neatendita renkontiĝo! Nia grupo venas de Moskvo. Antaŭ kelkaj tagoj mi demandis vian avon pri vi, sed li respondis, ke vi partoprenas baletan festivalon en Leningrado. Kaj sincere dirite, mi ne atendis renkonti vin. Hieraŭ vepere ni spektis baletan spektaklon en la nova salono sur „Oktjabrskaja“ . . .

— Vanjuŝa, — diris Maŝenka karesplene al li, — venu kun mi ĉe mia

onklino! Tie estos malgranda solenaĵo, kun mia onklo ili celebras dudekkvian datrevenon de sia geedziĝo. Ili atendas min.

— Dudekkvin jarojn, kiom mi estas! Sed unue mi devojiĝos al magazeno de floroj.

— Vi forgesis, ke estas nokto, ja nun regas la blankaj noktoj en Leningrado.

En la nigraj okuloj de Ivan ludas helaj flametoj, sed ŝajnas al mi ne nur ĝojesprime, sed ankaŭ de pura amo, kia en malmultaj homoj estas. Ivan havas belegajn ecojn — li estas saĝa, serioza, honesta, nobla, bela. Tiu idealala paro ekiris tiel flue, kiel la jam forirantaj belegaj sunradioj.

— Ĉu vi scias, Vanjuŝa? — diris Maŝenka kaj ekridetis.

— Ne, mi ne scias!

— Mia avo estas kulpa.

— Pri kio?

— Ke mi lernis Esperanton.

— Kaj kiel li sukcesis?

— Per siaj multnombraj korespondantoj. Mi neniam povus ellerni tiom da lingvoj, por ke mi interparolu kun homoj el diversaj landoj. Mi tamen havas grandan intereson pri la artoj — muziko, baletto, same tiel mi amas la poezion, la artan literaturon. Dank' al Esperanto mi renkontiĝas kun homoj diverslandaj, kiuj havas komunajn kulturajn interesojn, kaj tio estas por mi tre agrabla. Mi havas mirindan korespondadon pri la problemoj, kiuj interesas min.

— Ankaŭ mi ĝojas, Maŝenka, pri via sukceso kaj pri tio, ke vi jam tiel multe ŝatas Esperanton.

— Kiel bele estus, Vaniuŝa, se ĉiu homo sur la terglobo konus krom sia gepatra lingvo ankaŭ Esperanton.

— Efektive tiel estas, sed ne ĉiu homo tion komprenas.

Enlogite en interparolado pri la lingvo-problemo, ili nerimarkite ekstaris antaŭ la domo, en kiu loĝis la on-



klino de Maŝenka. Ivan volis diri ion al ŝi, sed haltis.

— Ni supreniru, Vanjuŝa!

— Maŝenka, estas jam tre malfrue — jam la unua horo. Mi venos nur por gratuli viajn geonklojn kaj revenos al la hotelo. Morgaŭ frumatene ni forveturos al Kievo.

— Morgaŭ matene! Kial vi ne servis min, kiam vi venis en Leningradon?

— Mi bedaŭras, Maŝenka, ke mi ne faris tion. Nun mi tre bedaŭras...

Ili haltis en la unua etaĝo kaj sonorigis. Ankoraŭ ne malŝlosinte la pordon, la onklino de Maŝenka brue sin ĵetis al ŝi, kisis ŝin kaj kun ioma riproĉo demandis:

— Kie vi malfruiĝis, kara mia?

— Mi petas pardonon, amata mia onklino! Surplace mi renkontis korespondanton de mia avo. Li estas el Bulgario. Bonvolu interkonatiĝi.

— Vinicka, — diris la onklino etendante sian grasetan manon.

Ŝi kondukis ilin en grandan salonon. Ĉirkaŭ ronda tablo sidis la gastoj kaj tostis pri la arĝenta geedziĝo. Regis rusa atmosfero — brua kaj kora.

— Ni havas gaston el Bulgario — ekkriis gaje Maŝenka, prezentante Ivan al la ĉeestantoj, kaj faris riverencon por gratuli siajn geonklojn.

— Do, ni trinku pri Bulgario, pri nia frata lando, — kriis hore ĉiuj kaj komencis tintigi la glasojn.

— Mi trinkas pri via vastega, belalando kaj pri la arĝenta geedziĝo de familio Vinicki — feliĉe ekridetis Ivan, kiel homo, kiu troviĝas inter proksimaj amikoj.

Maŝenka transdonis la pakajeton, kiun ŝi portis al siaj geonkloj kaj kisis ilin. Ivan tuj rememoris, ke ankaŭ li havas ion ĉe si — boteleton kun rozparfumo kaj lignan ujeton por ĝi.

— Malgranda donaceto el Bulgario — diris li, transdonante la parfumon al la onklino de Maŝenka kaj la lignoujeton al ŝia onklo. — Kaj tio estas por vi, Maŝenka, — li ŝovis en

ŝian manon palpebrumantan pajacon.

— Mi aĉetis ĝin hodiaŭ por iu infano, kaj ĉar Maŝenka estas ankoraŭ eta, mi supozas, ke la donaceto estas konvena, ĉu ne?

Ivan ridetis, vidinte, ke ŝi ekĝojis pri la ludilo. Ŝi ja estis ankoraŭ infano...

— Mi tre ŝatas ludilojn kaj tutkore dankas al vi; sed ĉu vere vi opinias, ke mi estas tiom malgranda? — diris Maŝenka kun evidenta malkontento.

— Jen tio montras, ke vi estas infano, se vi ofendiĝas, kiam oni diras al vi, ke vi estas eta, — daŭrigis Ivan per la sama ŝerca tono.

Ĉiuj komencis ridi, ĉar plenaĝuloj ĉiam deziras esti malgrandaj, kaj male — la etuloj deziras esti grandaj.

— Mi petas vin, eksidu por manĝeti! — diris onklino Vinicka.

— Vanjuŝa, kiom da frandaĵoj estas sur la tablo, vi ne rifuzos! — kaj Maŝenka rigardis lin kun peta rigardo.

— Nur unu sandviĉon — por ne ofendi vin.

— Ne, ne eble! Vi satmanĝos bone. Niaj gastoj ne devas foriri malsataj!

— Mi estas kortuŝita de via simpatia atentemo, — diris Ivan kaj ekmanĝis la sandviĉon. — Sed mi jam vespermanĝis. Oni tre bone manĝigas nin en viaj restoracioj.

La gastoj komencis prepari sin por foriro. Ivan ankaŭ ekstaris, prenis glason kun ĉampano kaj sin turnis al la familio Vinicki:

— Por adiaŭo, mi bondeziras al vi tiel ĝoje celebri ankaŭ vian oran jubileon. Nun mi atendas vin veni gaste al mi en Bulgario. Vi venos, Maŝenka, ĉu ne?

— Se ni estos vivaj kaj sanaj, ankaŭ tio povus okazi — respondis onklino Vinicka anstataŭ ŝi.

Ivan kaj Maŝenka interŝanĝis rapidan rigardon.

— Mi akompanos vin iomete, Vanjuŝa.

— Ne Maŝenka, tro malfrue estas.

La gastoj adiaŭis kaj disiris.

— Almenaŭ malsupren ĝis la pordo



LIKVIDITAJ KONTOJ
(Malbonaj ŝercoj)
de Mihail Căbanov

La ĉevalveturilo estis haltinta en malgranda libera loko apud la banejo. Estis ĉirkaŭ la dua posttagmeze. Varma malfrua somertago. La ĉevaloj dormetis kaj malvigle defendis sin kontraŭ muŝoj. Sur la fojno en la veturilo dormis vilaĝano kun vaste malfermita buŝo, kaj lia ronkado fendis la aeron ĉirkaŭe. Krome kion alian li povis fari? Li venis por aranĝi iun aferon en la oficejoj de la urbeto, sed en tiu momento ankoraŭ neniu laboris. La vilaĝano dolĉe kaj trankvile dormis.

De ie aperis Georgo la Kamelisto.

Vanjuŝa.

— Nu, akompanu lin iomete, — diris onklino Vinicka, rememorante sian junaĝon.

Restinte solaj antaŭ la enirpordo ili staris konfuzitaj, kaptitaj de ia eksterordinara sento.

— Maŝenka, vi malvarmumos, vi devas rehejmiĝi.

— Ankoraŭ iomete, — respondis ŝi, apogante sian dorson ĉe la pordo, ŝajne por varmiĝi.

Ivan karesis ŝian blondan harplektaĵon, kisis ŝin milde sur la frunto. Ma-

Tiu homo tre ŝatis fari diablaĵojn, estis fama per siaj ŝercoj kaj artifaĵoj. Komence li aŭdis la ronkadon kaj, vidinte la malfermitan buŝon de la vilaĝano, haltis kaj tuj komencis pripensi, kion li povus fari. Li ne pensis longe, elpoŝigis ĵurnalon, atente malfaldis ĝin, faris grandan funelon kaj metis ĝin en la malfermitan buŝon de la vilaĝano. Post tio Georgo rapide deflankigis kaj ekrigardis sian agon. Li restis kontenta. Ne post longe tamen li elpoŝigis alumetojn kaj ekbruligis la funelon elstarantan el la buŝo de la vilaĝano. Leviĝis abunda fajro. Eksentinte la varmon la vilaĝano vekigis kaj timigite forjetis flanken la brulantan funelon. La kamelisto memkontente kaj laŭte ekridegis. Pro lia rido vekigis la dormantaj metiistoj, komencis ĉirkaŭi la veturilon kaj komentarii la okazintaĵon. De ie venis la pastro el la sama vilaĝo de la malfeliĉa dorminto.

— Avo pastro, — ekparolis li, — diru al tiu homo, ke tiel oni me devas agi, ja mi dormis! Ŝerco ĉiam estas ŝerco, sed ĉio havas sian limon!

La pastro tuj komprenis, kontraŭ kiu estas direktitaj la vortoj de la vilaĝano, sed ĉio, kion li povis fari, estis tio, ke li diris:

— Kamelisto, vi estas pli nigra ol la plej nigra diablo. Diabla, malpura forto enkarniĝis ĉe vi! Ĉu vi ne hontas? Peke estas tiamaniere kondukti kun dormanta homo!

ŝenka ektuŝetis per varmaj lipoj liajn vangojn kaj ekflustris:

— Vi skribos al mi, ĉu ne?

Ivan ridetis, rememorante ŝian respondon, kiam li direktis al ŝi la saman demandon, sed nun li ne deziris ŝerci.

— Jam el Kievo. . .

Li direktis sin al la hotelo kun belegaj impresoj pri la horoj travivitaj dum tiu neatendita renkontiĝo. Kaj Maŝenka, kiel ĉiu virina koro, kun iom malsekaj okuloj malŝlosis la apartamenton de sia onklino.



La kunvenintoj evidente konsentis kun la pastro, tamen la Kamelisto rapide ŝanĝis la situacion, demandante: „Kiu donos al mi akvoversilon, ĉar la mia ne taŭgas. Kiu donos al mi akvoversilon?“ Ekplodis nova pli forta rido kaj la observantoj disiris. Komen- ciĝis denove la gaja bruo de la somera labortago. La vilaĝano donis al la ĉe- valoj fojnon kaj iris por prizorgi siajn aferojn. Ĝis la nokto oni parolis pri la Kamelisto — kia granda ŝerculo li estas, kaj pri la vortoj de la pastro, direkti- taj al li.

Tamen la sekvan nokton la Kame- listo, portante plenan akvoversilon, ne- rimarkite grimpis sur arbon meze de la pastra korto. Sub tiu arbo somere dor- mis la pastro kun sia edzino por gardi la sternitajn por sekigo tabakfoliojn. Jam la lacaj pastro kaj ties edzino, fininte la vespermanĝon, sin kuŝigis sub la arbo kaj tuj ekdormis.

Estiĝis profunda somera nokto. Ĉio silentiĝis. Nek hunda bojo, nek koka kikeriko. Ĉio dormis dolĉe.

Kaj kia luno! La ĉielo dronis en arĝento, la steloj (ho, tiuj someraj steloj!) tremis, tremadis kaj brilis, kva- zaŭ la nokta silento sonoretus!

Nur la Kamelisto ne dormis. Li kli- nis desupre la versilon kaj malvarme- taj gutoj komencis fali sur la vizaĝojn de la dormantoj. Ili tuj eksaltis kaj la pastro diris:

— Edzino, rapide ni kolektu la kad- rojn por konservi la tabakon.

Rapidante, la pastro frapis sian frun- ton ĉe ia trabo kaj eksentis doloron.

Post la matenliturgio de la sekva tago, kiam la pastro eniris la kafejon, oni vidis, ke li estas bandaĝita per blanka tuko. En la kafejo sidis viroj jam re- venintaj de la tabakkampoj. Tie ĉeestis ankaŭ la Kamelisto. Ĉar liaj gepatroj loĝis en tiu vilaĝo, li ofte tranoktis ĉi tie. Nun la Kamelisto trankvile trinkis sian kafon kaj silentis. La viroj, ne- sciante la historion pri la pastro, ko- mencis ŝerci kun li:

— Avo pastro, kiu vin batis?

— Ho, vi! Vi predikas al ni ne adulti, ne peki, sed jen vi mem. . .

La pastro aŭskultis ridante la ŝercojn kaj fine, kiam ĉiuj eksilentis, diris pa- cige kaj serioze:

— Dum la nokto, kiam subite ekplu- vis, en la rapidemo mi. . .

Leviĝis granda bruo. „Pluvo dum tiu nokto?“ Kion vi parolas, avo pastro?“ Ĉiuj komencis ridi plej laŭte, nur la Kamelisto silentis rigardante flanken.

La pastro komprenis ĉion. Li diris:

— Kamelisto, tion mi neniam pardo- nos al vi — memoru bone!

Kaj vere li ne forgesis.

En la komenco de l'aŭtuno alvenis ciganoj, kondukantaj ursojn. La pastro vidis la ciganojn kaj invitis ilin tra- nokti en lia domo. La ursojn li ensta- ligis. Ĉio estis farita rapide. La pastro avertis la ciganojn ne brui kaj donis al ili vespermanĝon. Poste li petis sian edzinon voki la Kameliston por kuraci ilian bovidon, kiu ŝajne estis malsana. La edzino ekmiris:

— Nenio okazis al la bovido, kial vi diras, ke ĝi estas malsana?

— Iru, iru kaj ne demandu! Rapide! Mi ĵus vidis la Kameliston preterpasi.

Krom per siaj petolaĵoj, la Kamelisto estis konata ankaŭ kiel brutkuracisto.

Kiam la edzino de la pastro diris al la Kamelisto, ke la bovideto estas malsana kaj la pastro vokas lin por ĝin kuraci, la ŝercemulo diris al si: „Saĝa Georgo, jen momento, kiam vi manĝos platkolbason!“

Kaj la Kamelisto tiel rapide ekmar- ŝis, ke la virino apenaŭ sukcesis post- sekvi lin survoje. Li eniris la korton kaj jam de la pordo demandis:

— Kie estas la bovido?

La edzino de l'pastro respondis:

— En la stalo! Mi alportos lanternon!

— Ne bezone, ne bezone — diris la ŝercemulo, — mi tuj komprenos, kion oni devas fari! Kaj li eniris la stalon. Interne jam estis plena mallumo. La Kamelisto palpe trovis ian korpon de



PRINTEMPA PANORAMO

de Stefan Kiraĝjev

Pompa kaj solena
la Printempo venas!

La natur' jubilas.
Varma suno brilas,

kisas kun tenero
la gravedan teron

kaj la humo poras,
spiras kaj vaporas.

La ĉiel' lazura
tremas klara, pura.

Vastas horizonto,
plialtiĝas monto.

Vento aventuras,
flutas aŭ tamburas.

Aglo kun fiero
ŝvebas tra l'aero.

Tondas la hirundoj
la ĉielprofundojn.

Klaraj akvoj fontas,
riveretoj ondas.

En la marĉaj kanoj
kvakas ĥore ranoj.

Cikonioj, vadas,
ranojn rekaptadas,
glutas apetite
al kvakado spite. . .

Post la vintra dormo
blovas vivoŝtormo.

Bolas viv' interna.
Herboj, floroj ĝermas.

Fluas limfoj dolĉaj,
ŝprucas sukoj sorĉaj.

Arboj disburĝonas,
floroj ilin kronas.

Herboj, arboj, floroj
sendas bonodorojn.

La aero molas.
La kukol' kukolas.

Sub la sunradioj
flugas papilioj,

zumas la abeloj,
portas sin libeloj.

Najtingaloj, merloj
ŝutas sonojn-periojn.

Pegoj frapas, krakas,
pigoj raŭke grakas.

Birdoj plektas nestojn.
Homoj bredas bestojn.

Sur la kampoj, vojoj
rido, vortoj ĝojaj,

kantoj, melodioj,
flustroj, voĉoj, krĵoj.

Sonas: Hi hi! Ha ha!
Ha lo! Hola! Pa pa!

Tin tin! Baj baj! Lu lu!
Kvivit kvivit! Glu glu!

Bojoj, zumoj, pepoj,
muĝoj, henoj, blekoj.

Centoj da koloroj,
bruo kaj sonoroj! . . .

Estas bonvetero
kaj fekunda tero.

Batas ĉiu koro,
ŝatas la laboron,

ĝin — la pulso senca
de la viv' potenca.

Jen traktoroj ruĝas,
plugas, erpas, muĝas.

Viroj kaj virinoj
klinas fortajn spinojn.

Fosas, semas, plantas,
butas, ridas, kantas —

en la konkuradoj
penas la br'gadoj! . . .

Flutas ŝalm' miela,
ŝutas kanton belan.

La alaŭdo alte,
dolĉe kaj ekzalte

kantas en aŭroro
himnon de l'laboro! . . .

Gejunuloj flamas,
gajas kaj sin amas. . .

Panjoj en ĝardenoj
iras al promenoj

kaj ĉaretojn puŝas.
Ene beboj kuŝas.

Lipoj ektremetas —
en la dorm' ridetas. . .

Ankaŭ la infanoj
plektas etajn manojn,

daŭncas, kantas, saltas,
kuras kaj ne haltas.

Ludas kaj petolas —
ŝprucas ridoj, bolas! . . .

Sun' la teron banas.
Pulsas viv' spontana.

Ĝoja, vigla, nerva,
la juneco vervas!

Tuta mondo festas!
— Ja printempo estas!

besto kaj opiniante, ke ĝi estas nome la bovido, li ekserĉis ĝian kolon por ĝin sufoki. Tamen anstataŭ la bovidon li trafis unu el la ursoj. La urso ektimis kaj laŭtvoĉe ekmuĝis, svingante piedegon en la mallumo. Feliĉe ĝi trafis nur rande la jakon de la neaten-dita gasto. La jako estis disŝirita.

Nek viva, nek morta Georgo la Kame-

listo fuĝis el la stalo. Lia tuta korpo tremegis kaj li apenaŭ staris sur siaj kruroj.

Alvenis la ciganoj. Leviĝis grandega bruoj. Alvenis ankaŭ la ruza venĝema pastro kun lanterno en la mano.

— Bonan vesperon, Kamelisto, — li diris malice. — Mi kredas, ke niaj kontoj jam estas sufiĉe bone likviditaj! Nu, bonan nokton!



Ni estis tre feliĉaj viziti dum du neforge-seblaj semajnoj la sunan, belegan Bulgarijon. La kaŭzo de ĉi tiu vizito estis la konkurso de la Bulgara MEM-Komitato en „Paco“, № 1—2, 1970. Mia edzino partoprenis la konkurson kaj havis la ekstran feliĉon gajni la unuan premion: „Senpaga unusemajna restado en Bulgario, sen vojaĝkostoj“. Por plene utiligi la neatenditan ŝancon — viziti la malproksiman, sed logantan landon, ni petis la MEM-Komitaton permesi plilondigon de la restado kaj ke mi akompanu mian ebzinon, memkompreneble, je miaj propraj kostoj. La peto estis akceptita, ni ricevis invitleteron, do ĉio estis en bona ordo kaj ni povis alveni la okan de majo 1971 sur la flughavenon de Sofio. Ni estis iom scivolemaj, kiel okazos la akcepto, ĉar la invitantoj kaj ni ja ĝis nun ne vidis unu la alian. Sed niaj surprizo kaj ĝojo estis grandaj, kiam la prezidanto de la Mondpaca Esperantista Movado, s-ano Aleksiev mem, akompanita de s-ino Vasja Petrova, nin tre kore kun belaj floroj bonvensalutis. Ili tuj prenis nian pakadon, metis ĝin kaj nin en taksion kaj gvidis nin zorgeme al nia hotelĉambro. Poste ni komune tagmanĝis kaj preparolis nian restadprogramon.

La programo estis tiel variplena, ke ni dum nia septaga restado en Sofio ricevis multajn impresojn de la belega urbo, de ĝiaj vidindaĵoj, muzeoj, kultura kaj politika vivo. Nin akompanis ĉiutage iu el la sofiaj samideanoj, kiu montris kaj klarigis al ni ĉion sci-kaj vidindan, prizorgis nin afable. Kun ĉiu akompananto ni rapide amikiĝis. Dum la vesperoj ni vizitis cirkon, belegan folkloran prezentadon de la mondfama „Bulgara Danc-, Kantad- kaj Muzik-Ensemblo“ kaj altnivelan simfonian koncerton. Eksterordinaran impreson pri la batalplena historio de la bulgara popolo kaj ĝia brava, kuraĝa kaj heroo laboristaro peris al ni la vizitoj de la Maŭzoleo kaj la Domo-Muzeo de Georgi Dimitrov, same kiel la Muzeo de la Revolucia Movado. Kun respekto ni pliriĉigis nian scion pri la mondfama heroo Georgi Dimitrov, kiu per sia kuraĝa batalo kontraŭ la germana faŝismo superis la nacian kadron kaj akiris plej grandan signifon por la tuta progresema homaro! Dum nia restado ni ĉie povis konstati la nunan sukcesplenan evoluon, la konstruadon de novaj loĝdomoj, kulturaj kaj industriaj objektoj, la progreson de la liberiĝinta bulgara popolo.

Ni ankaŭ vizitis ordinaran kunvenon de la

urba Esperanto-societo „Maksim Gorkij“. Tie ni aŭskultis bonan paroladon de la bulgara sciencisto-esperantisto Vasil Ĉoĉev pri la verkita de li libro, kiu traktas la problemon pri ĝusta kaj kultura uzado de la libertempo en la socialisma socio. La sekvintaj diskutoj montris grandan intereson pri ĉi tiu problemo. Kiam je la fino de la kunveno en la nomo de mia edzino kaj de mi mem mi direktis kelkajn salut-kaj dankvortojn al la gastamaj geesperantistoj, mi ricevis koran aplaudon de la plurdekoj da ĉeestantoj. Ankaŭ tie ni sentis la proverban korecon de la bulgaraj gekamaradoj. Apartan ĝojon ni spertis, kiam inter la amikoj ni ree vidis nian amikinson Dimitriĉka, kun kiu ni jam en Szeged, Hungario, antaŭ du jaroj amikiĝis. Do, ankaŭ tiu kunveno estis agrabla travivaĵo por ni.

S-no N. Nikolov de la bulgara Esperanto-Turismo konigis al ni la ĉirkaŭaĵon de Sofio. Kun li ni vizitis la belegan Vitoŝa-monton kaj la montodomon „Esperanto“, situantan sur la sama monto. Kune kun s-ino Virginia Vasileva ni ekskursis al urbo Radomir, kie loĝas nia korespondamiko Ivajlo. Tie en lia naskiĝdomo ni denove ĝuis la faman gastamecon de la bulgara popolo.

Jam sep tagoj forpasis en la bela Sofio kaj ni devis forveturi al Varna, por ripozi dum novaj sep tagoj ĉe la bordo de la Nigra Maro. Ankaŭ en Varna nin ne forlasis la prizorgo de niaj amikoj. Ni estis akceptitaj de la bonhumora s-no Georgi Dimov, kiu enhoteligis nin en la novan kaj ekskluzive modernan „Internacian Ĵurnalisthejmon“. Ni loĝis en komforta ĉambro de la sepa etaĝo kun balkono, kiu ebligis rigardi rekte al la maro. Ankaŭ ĉe la maro ni gajnis novajn amikojn, kiuj nin afable prizorgis. Eĉ ĉe la akceptejo de la hotelo ni trovis Esperanto-amikinson, s-inon Elisaveta Ruseva, kiu parolas dekdu lingvojn, inkluzive germanan kaj Esperanton. Do, por ni la lingvo-problemo ĉie estis solvita.

Reveninte de Varna al Sofio, kie ni devis ŝanĝi la aviadilon por revojaĝi al Berlino, nin atendis denove niaj novaj amikoj de Sofio kun granda bukedo da belaj floroj. Do floroj ĉe la akcepto, floroj ĉe la adiaŭo, floroj de amikoj al amikoj! Kun bedaŭro post du horoj ni devis forlasi la belegan, gastaman Bulgarijon kaj niajn ĉarmajn afablajn geamikojn. Neniam ni forgesos ilin kaj la belajn tagojn en Bulgario! Nian plej koran dankon ni direktas al ĉiuj, kiuj ebligis la interesan vojaĝon kaj kiuj faris ĉion por sukcesigi nian restadon.

Fritz kaj Elli Hoffmann,
Germana Demokratia Respubliko

* La materialo estas verkita speciale por „Bulgara Esperantisto“.

Ĉefredaktoro: Kunĉo VÂLEV

Redakta Komitato: Bojka BATALSKA, Asen GRIGOROV, Tatjana EVSTRATIEVA, Stefka HRISTOVA, Venelin MITEV, Ivan SARAFOV, Simeon D. SIMEONOV.

Korektis: Rajna Arnaudova

Sofio, poŝkesto 66

Tel. 83-26-82

DEZIRAS KORESPONDI

Anglio

Vanessa Tacols, 41 Rurskin Road, Ipswich, Suffolk IP4 4JPT (lernantino — ĉt, speciale pri baleto, muziko, sporto; bk, pm).

Bulgario

Snejana Stojčeva — str. Otec 1/20, Pernik, kun ĉl pri ĉt, interŝanĝas pm, bk, gramofondiskojn.

Radka Simecnova — str. Moskovska 20, Ŝumen — kun ĉl pri ĉt.

Ĉeĥoslovakio

Vladimira Skonpilova — str. Gotwaldova 14, Vyskov 1 u Brno (kun ĉl pri ĉt, interŝanĝas bk).

GDR

Manfred Trenne, Otto Richter str. 34, 301 — Magdeburg (24 jara kemiingenero — kun bulgaroj).

Horst Steinbrück, 2091. Annenwalde Krs. Templin (47-jara, fakvendisto — kun ĉl pri ĉt, interŝanĝas pm, pk, esperantaĵojn).

Jugoslavio

Slobodan Vukašinović, str. Takovska 22 32 300 Gornji Milanovac, (22-jara, kun bulgaraj esperantistoj pri ĉt).

Zivko Milošević, str. Singelićeva 21, 32 300 Gornji Milanovac (30-jara — kun bulgaroj pri ĉt).

Mongolio

G. Luvsandorĝo, str. Ŝuudan — Ĥajread 834, Ulan-Bator (33-jara bibliotekisto — kun ĉl pri ĉt).

Nederlando

Adr. v. d. Hoeven, poŝtkesto 9751, Den Haag 2078 (kun ĉl pri ĉt; petas alsendon de E-gazetoj por aranĝi E-domon).

Pollando

Bożena Florczuk, str. J. Dąbrowskiego 56 m 29, Łódź (lernantino, pri ĉt kunĉi).

Jadwiga Lenczewska, Iwino, pta: Kostyżyn wkp. pow. Skoda (19-jara kun, bulgara junulino — pri muziko, filmoj).

Wanda Radcchonska, str. Kilńskiego 10, Pošta Teknikumo, Przemyśl (17-jara lernantino — bk, pm).

Jadwiga Janeczek, str. Wieczorka 3/4 Mysłowice, woj. Katowice (15-jara lernantino) — pri libroj, filmoj, muziko, sporto, pm, bk).

Andrzej Pasionek, str. Elektoralna 17-c m. 22, Warszawa (pm, bk).

Nanna Ciszewska, str. Grottgera 10 m 6, Warszawa I, (18-jara studentino).

Stryczynska Anna, str. Świerozewskiego 14, Radomyśl Wielki, pow. Mielec, woj. Białystok (22-jara — pri ĉt, sporto, pm).

Elżbieta Krukowska, skr. poczt. 25, Radymno, woj. Białystok (17-jara lernantino).

Jerzy Simka, str. B. Wiechulowa 21, Katowice 8 (18-jara — pri turismo, fotografio, pm, bk).

Jan Karasinski, str. Barbary 29, Chorzów I, woj. Katowice.

Urszula Wojtyła, str. Paderewskiego 15/8, Bydgoszcz (16-jara, pri lingvoj).

Wiesław Pisarski, str. Graniczna 28/30, Skarżysko — Kam, woj. Kieleckie (lernanto — pri muziko, filmoj, sporto, pm, bk).

Marian Solecki, Mikoków, K. Miarki 26/49, Tychy (20-jara studento pri ĉt, pri muziko, filmoj, poezio).

Danuta Szydełowska, str. Sokolska 9, Krynki, pow. Sokolska, woj. Białystok (23-jara — sporto, muziko, filmoj).

Preyer Korner, Nalęczów (24-jara masagisto — pri moderna pentro-arto, muziko, pm, bk. — kun junaj bulgaroj).

Sovetunio:

Ludmila Varaksina, str. Voločilnaja 5, kv. 4, Gorki-80 (kun ĉl. pri ĉt).

Jan Trizerovskij, Glavnij Počtamp, Do voŝtebovanija, Ĉernigov (21-jara lernanto en ĵura teknikumo — pri studenta vivo, ĵuraj temoj, sporto „Izko“, insignojn, esperantaĵojn).

Aleksandr Kotkov, str. Parkovaja 20—45, Ufa-73, USSR — 450 073 (23-jara oficisto — pri muziko, literaturo, pentroarto, lingvoj k.a.).

Esperanto-familio: Biruta Vārpina (instruistino — kun ĉl pri ĉt, ankaŭ bk, pm, insignojn); Viktors Laškovs (oficisto — pm, monerojn kaj monbiletojn) Adreso: str. Lebedeva 28—18, Cēsis, Latvija SSSR.

Aurelija Kligyte, str. Zemaites 42-7, Šiauliai, Litovio (19-jara studentino de arkitekturo — pri arto, arkitekturo, kultura vivo).

Sonja Vahitova, str. Posvojskogo 21 kv. 10, Ufa 15, USSR 450 015 (22-jara studentino — literaturo, filmoj; specialan intereson pri Bulgario).

Ĝergej Aleksandrovič Ponomarev, str. Petrozavodskaja 22 k. 5, kv. 219, Moskvo A 414 (kuracisto — kun kuracistoj precipe el socialismaj landoj pri nervologiaj problemoj).

A. N. Bogdanov, str. Sverdlova 23—8, Kiev 3 (kuracisto infektologo — pri ĉt kaj pri profesiaj problemoj kun ĉl).

